

# LA ONDO de Esperanto

*Internacia sendependa magazino en Esperanto*



Marto  
2007

№3

# LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2007. №3 (149)

**Aperas** ĉiumonate

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov

**Refondita** en 1991

**Eldonas kaj administras** Halina Gorecka

**Redaktas** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj** Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloísio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

**Adreso** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Telefono** (4012) 656033

**Elektronika poŝto** [sezonoj@kanet.ru](mailto:sezonoj@kanet.ru)

**Hejmpaĝo** <http://Esperanto.Org/Ondo>

**Abontarifo por 2007**

*Internacia tarifo:* 32 eŭroj

*Orienteŭropa tarifo:* 18 eŭroj

*Ruslanda tarifo:* 390 rubloj

*Pollanda tarifo:* 60 zlotoj

*Aerpoŝta aldon:* 5 eŭroj

*Elektronika abono (pdf):* 12 eŭroj

**Perantoj** vidu la liston sur la 23a paĝo de la februara kajero.

**Konto ĉe UEA** avko-u

**Recenzoj** Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

**Eldonkvanto** 700 ekzempleroj

**Anonctarifo**

*Plena paĝo:* 100 EUR (2000 rubloj)

*Duona paĝo:* 60 EUR (1200 rubloj)

*Kvarona paĝo:* 35 EUR (700 rubloj)

*Okona paĝo:* 20 EUR (400 rubloj)

*Malpligrandaj:* 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm<sup>2</sup>

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripetito.

**Donacoj** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

**Represoj** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2007.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2007, №3 (149).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 26 февраля 2006 г.

Цена свободная. Тираж: 700 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

## Vortoj de Komitatano Z.

### *Elektoj en UEA... ĉu vere nun?*

**K**iu ne memoras, ke antaŭ tri jaroj estis elektoj en KUEA, tiu ne divenas, ke ĉi-jare ili denove okazos. Rara antaŭsigno pri ili estis la novjara mesaĝo de prezidanto Renato Corsetti, kiu anoncis ĝin esti lia lasta. Cetere la movada gazetaro kaj retlistoj prisilentas la aferon. Eĉ klaĉoj ne estas. Ke ankaŭ la revuo *Esperanto* silentas, estas jam praktiko, kvankam ĝuste ĝi devus esti la ĉefa instiganto de “elekta etoso”, esprimo, kiun Osmo Buller iam vartis sed kiun eĉ li nun evitas. Anemio, apatio, pasiveco ĉie.

Formale la elektokomisiono devas prepari la elektojn. Pro nekomprenebla kialo unu el ĝiaj membroj estas Edvige Ackermann, eĉ ĝia gvidanto. Tiun rolon ŝi havis ankaŭ en la antaŭaj elektoj, kiam ŝia funkciado estis kritikata pro kaoseco kaj malobservo de reguloj. Unue ŝajnis, ke ŝi faris el tio pravan konkludon, ĉar jam antaŭ la UK en Pekino ŝi paŭte deklaris en la reto, ke ŝi rifuzas plu resti komitatano. La aliaj komitatanoj bezonis nur unu jaron por forgesi ŝian stumbladon kaj ree koopti ŝin kiel komitatanon kaj elektokomisionanon. Pruvita maltaŭgeco ne aperis kiel malhelpo. Aŭ ĉu oni bonvole donis novan ŝancon? En koridoroj oni flustris, ke ŝi bezonis gravan postenon por povi pavi hejme en Italio, precipe fronte al Michela Lipari, kun kiu ŝi kronike malpacas. Aliaj rebatis, ke kvankam la damoj febrigas la italan movadon kverelante trans ĉies kapoj, sur mondaj podioj ili vivas en simbiozo.

Nun ni jam scias, ke Ackermann ne lernis sekvi la regularon. Minimume ses monatojn antaŭ la UK — komence de februaro — la komisiono devis raporti pri kandidatoj kaj cetera progreso de la elektopreparoj. Tio ne okazis, sed tamen Ackermann povas dormi trankvile, ĉar neniu komitatano plendis. Tiuj, kiuj ne interesiĝas, ne plendas. La letargio, kiu plagas UEA, kulminas en ĝia supera organo. Eĉ la afabla Corsetti komencis komenti la superan komaton per malpli karesa elekto de vortoj anstataŭ plu konsoli sin, ke en ĉiu alia niĉo de la asocio estas pli da vivo ol ĉe la supro.

Ĉu pli viva niĉo estas la estraro? Mi dubas. Oni apenaŭ rimarkas ĝin, kvankam ĝuste ĝi devus sendi motivigajn impulsojn ĉiudirekten: al la komitatanoj, komisionoj, landaj kaj fakaj asocioj, kaj al la membroj. Kien malaperis estraranoj kun pli ol mezaj kapabloj, kleraj kaj larĝhorizontaj movadanoj, kiujn aliaj rigardas kun respekto kaj fiero? Nun la estraro ne radias ion, kio nature katalizus agadon ĉe aliaj. Ni esperu, ke ekkonscio pri la interesoj de UEA igos la komitatanojn reelekti tute novajn kaj freŝajn homojn, eble kun la sola escepto de Renato Corsetti, kiu ja meritas rekonon, ke dum la pasintaj jaroj li ne estis superflua. Memori tamen, ke damo Edvige estis reelektita malgraŭ fuŝa laboro, ne nutras esperon.

*Komitatano Z*

Ni kore gratulas ĉiujn niajn legantinojn, aŭtorinojn kaj ĉiujn virinojn (ankaŭ la surkovrilajn partoprenantinojn de unu el la projektoj de *La Loko*) okaze de la Internacia Virinfesto!

# La plej bona Loko

**La Loko estas tegmenta nomo por kelkaj projektoj, kiujn Daniel Salomon kaj Olof Olsson realigas en diversaj sferoj. Hodiaŭ ili respondas al niaj demandoj.**

Daniel: Mi estas Daniel Salomon. Mi naskiĝis en 1976 en Danio. Mi kreskis en Francio, studis arton en Francio, Danio kaj Germanio. La pasintan jaron mi loĝis en Londono. Nuntempe mi ne scias, kie mi loĝas.

Olof: Mi estas Olof Olsson. Mi naskiĝis kaj kreskis en Svedio, sed mia patrino estas nederlanda. Mi studis la anglan lingvon, filozofion, fotografion kaj arton. Nuntempe mi loĝas en Kopenhago.

**Kiam kaj kial vi lernis Esperanton? Ĉu vi iel utiligis Esperanton en la antaŭloka epoko?**

Ni ĉiam sciis ke esperanto ekzistas, sed ni neniam sentis la urĝon lerni ĝin ĉar ne montriĝis bezono. Unu tagon hungara amiko de Olof plendis pri la fipremanta devo komuniki anglalingve. Tio kaŭzis, ke reflektado pri lingvo kaj ĝia efiko al ni homoj eniris la konversacion, tra niaj pensoj, sentoj kaj ŝercado. El tiuj tri aferoj konsistiĝas la motoro de la arta proceso — fulmideoj. (La interrilato ne estas logika aŭ antaŭkalkulebla tamen fundamente nepra.) En la formo de tia fulmideo naskiĝis *La Loko*.

Ni ekuzis esperanton per *La Loko* kaj ekigis *La Lokon* per esperanto. Ke ekzistas komunumo da parolantoj ni ne sciis kaj ankaŭ ne pridemandis. Jam antaŭe ni havis la ideon startigi projekton, kiu havas tutneŭtralan deirpunkton, bazon, kiu penetras ĉion kaj povas esti rilatigata al ĉio. Esperanto ofertiĝis kiel la fadeno, kiu havas la potencon kunligi projektojn kaj ideojn pri la plej diversaj aspektoj de la vivo kaj la plej diversaj spacoj en la kosmo, ĉu realaj aŭ konstruitaj. Esperanto aperis al ni ne nur kiel lingvo, sed kiel fenomeno, filozofio kaj vivstilo. Kompreninte ĝian potencon, lerni ĝian eksteran formon estis nur rimedo materialigi ĝian esencon.

**Kion celas *La Loko*?**

*La Loko* estas laboratorio, kiu ekzistas en materiala kaj interdimensia sfero. Pro tio ĝiaj funkcioj estas nedifineblaj kaj senlimaj — tio, kion oni enmetas, trairas proceson de transformiĝo kaj elvenas produkto tutnova,

kreiĝinta laŭ la sama principo kiel fulmideo. Same kiel esperanto, *La Loko* estas platformo, sur kiu eblas priskribi ĉiajn enhavojn de la universo. Kelkaj kampoj, kiujn ni jam esploris, estas filmado, gastronomio, arkitekturo, danco, desegnado, komunikiloj, sporto, politiko kaj konversaciado.

Rilate al la konkreta rolo, kiun ĝi havas por la esperantista komunumo, ni povas diri la sekvan: “Esperantujo” estas mondo, kiu ekzistas en la kapoj de homoj kaj iĝas reala nur per interretaj projektoj aŭ dum kongresoj. *La Loko* kreas realan esperantan universon, kun esperantaj objektoj, manĝaĵoj, komunikiloj, ejoj kaj vivstilo. Esperanto iĝas tuŝebla, gustumebla, spertebla per ĉiuj sensoj de la homa korpo.

***La Loko* famiĝis en Esperantujo per la kampanjo por Esperanto-teamo en la futbala mondopokalo 2010.**

Ni kampanjas por ke la Esperanto-teamo partoprenu en la Mondpokalo de FIFA en Sud-Afriko en 2010. Disvastiĝis la informo, ke la projekto estas nur truko por altiri la atenton de la amas-komunikiloj al esperanto. Sed tio nur estas kromefiko. La fakta celo estas kunligi la idealisman lingvon esperanto, kiu alparolas ĉefe intelektulojn, kun sporto, kiu movigas homamasojn, ekigas emociojn, fanatikecon kaj identigon. Sed, male al la strukturo de la ĉampionado kiu tradicie baziĝas sur patruja fiero kaj patriotismo, ni proponas al la ludantoj kaj fervoruloj futballon sen nacia ŝovinismo. Nia teamo

elstaras ĉar ĝi apartenas al neniu lando sed tamen integriĝas en la spirito de la ludoj.

**En via retejo estas listigitaj pliaj projektoj: *Ovo*, *Kolbasoj sen limoj*, la rekta metodo, la amikeco-konferenco en Tajlando k.a. Bonvolu rakonti.**

*Ovo* ekzistis en majo-junio 2005. Ĝi estis la unua esperanta rapidmanĝejo kaj ni surtabligis nur mole boligigitajn ovojn. La ovo kun ĝia kompakta formo kaj ĝia uziĝo en nekalkuleblaj diversaj pladoj ĉie en la mondo estas reprezentata por koncepto de esperanto, kiu estas ankaŭ imanenta en la arkitekturo de la naturo. Tiun koncepton *Ovo* aplikis al la fenomeno de rapidmanĝejoj. Ĝi transprenis la formon de hodiaŭa pragmata ekonomio (modelo McDonald's) kaj plivastigis ĝin je la valoro travidebleco. Tio signifas, ke la kliento scias, kion li manĝas kaj de kie ĝi originas, jen la natura, perfekta rilato inter homo kaj lia manĝaĵo.

*Kolbasoj sen limoj* estas kolbasfirmao, kiun ni lanĉis en Rejkjaviko. En Islando la hotdogo fariĝis preskaŭ la nacia plado. La islandanoj fiere manĝas siajn naciajn kolbasojn, precipe la 17an de junio, kiu estas la nacia tago. Ni volas oferti alternativajn kolbasojn; kolbasojn kiuj ne reprezentas landon. Tial ni lanĉis *Kolbasojn sen limoj*. Krome niaj kolbasoj estas faritaj el islanda ŝafviando. Tiel ili estas turnpunkto en la kolbaskulturo, kiu estis asociita kun meza kvalito kaj la stato de stratmanĝaĵo. Ni lanĉis la projekton en la Viva ArtMuzeo en Rejkjaviko la 17an de junio, la nacian tagon mem. Ĉiuj ĉeestantoj havis la eblecon gustumi la kolbasojn. Nia malferma parolado estis belege tradukita el esperanto al la loka lingvo per loka esperantisto. 🐾 pĝ. 4



(El la 3a paĝo)

Por la magazino *Der Freund* ni kreis lingvokurson *La rekta metodo*. La kurso donas ne nur gramatikajn regulojn de esperanto sed ankaŭ kontinuigatan rakonton. En ĝi eblas interpreti moralajn kaj sociopsikologiajn enhavojn. La celgrupo de la kurso do estas tiuj, kiuj scivolas pri la lingvo kaj tiuj, kiuj interesiĝas pri demandoj de moralo kaj homa psiko/socio.

Unu el niaj plej ŝatataj projektoj estas nia taja-esperanta amikeco-konferenco. Per tre limigitaj rimedoj, ni aranĝis konferencon promociantan esperanton en Tajlando. Esperanto estas preskaŭ tute nekonata en Tajlando, tial aranĝi tian eventon estas defio. Per malmultaj fortaj simboloj kiel flagoj, interpretisto kaj speciale farita kuko, ni sukcesis fari ion, kio aspektis sufiĉe formala, kio similis al diplomata kunveno. Kvankam la projekto estis iom humura, ĉeestintaj ĵurnalistoj skribis seriozajn artikolojn pri esperanto kaj ĝia ebla bonfaro por Tajlando.

#### Kio por vi estas Esperanto?

Ni forte kredas, ke esperanto, la lingvo kaj ĉio, kio ĝi estas krome, povas plibonigi la mondon. Ni uzas ĝin en nia arto kiel metodikan modelon kaj per ĝia ekzemplo ni malkodas la gramatikon de ekzistantaj aĵoj. En ĝia konstru-maniero evidentiĝas al ni la interna strukturo de la mondo. Tiusence ĝi estas la plej natura lingvo, kiu ekzistas. Kaj ĉi tian koncepton ni aplikas al niaj produktoj; kiel esperanto ili estas universalaj, belaj, simplaj, funkciaj, egalecaj, demokratiaj, direktaj kaj amikaj. Ĝi do utilas al ni kiel modelo sed ni ankaŭ kontribuas al ĝi, esplorante novajn ebenojn kaj dimensiojn, aplikante ĝin al novaj vivterenoj kaj taskoj. Nur per aplikado, servado kaj utiligado esperanto povas plivastiĝi kaj evolui de virtuala revmondo al reala vivkadro.

#### Ĉu arto povas esti facila kiel Esperanto?

Arto ĉiam estas tiom facila, kiom ĝia ricevanto. Same kiel esperanto, ĝi en si mem estas nenio, kio enhavas ĉion. Nur per la interpretado/uzado de la ricevanto povas iĝi io kaj ricevi signifon. Arto estas facila ĉar neniu bezonas ĝin. Ĝi estas tute libervoldependa kaj estas la plej alta ŝtupo de homa vivado/pensado. La kulminpunkto de tio estas perfekta simpleco, travidebleco, egaleco kaj universaleco. Same kiel esperanto, ĉiuj artaj esprimoj estas orbitoj, kiuj nekonstante cirkulas pli aŭ malpli proksime ĉirkaŭ tiu stato.

<http://www.laloko.org>



#### Oratora konkurso en Jokohamo

En la 92a UK en Jokohamo denove okazos Oratora Konkurso por junularo. Rajtos partopreni gejunuloj ĝis 30-jaraj, kiuj aliĝis al la UK. Partopreno estos senpaga, sed la kandidatoj devos skribi anonci sin minimume unu tagon antaŭ la konkurso al la estrarano pri kulturo s-ino Claude Nourmont, [moonmont@pt.lu](mailto:moonmont@pt.lu).

La junaj oratoroj povos elekti inter kvar temoj:

— Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto

— Kiel la reto ŝanĝas la Esperanto-movadon?

— Ĉu ni lernas el pasinteco?

— Sciencfikcio — ĉu fantazio aŭ aŭguro?

Oni devos paroli pri la elektita temo libere, sen antaŭpreparita teksto, sed oni rajtos uzi memorigajn notojn. La maksimuma daŭro de parolado estos 10 minutoj. La plej bonaj konkursantoj ricevos libropremiojn. **GK UEA**

#### Plia ŝtupo en Liaoning

En januaro de 2007 LEA (Liaoning-provinca Esperanto-Asocio, Ĉinio) oficiale sankciis la peton de Wafangdian Yilin Fremdlingva Lernejo pri fondo de Kleriga Bazo de Esperanto (ĉefe por elementaj lernejoj). Ĝi estas la dua kleriga bazo de Esperanto en la provinco post la bazo starigita por altlernejoj en Shenyang Muzika Universitato en la pasinta oktobro.

15 geknaboj de elementaj lernejoj komencis lerni Esperanton en la unua kurso de la bazo en januaro. Wang Yun gvidas la kurson laŭ la lernolibro *Esperanto por Infanoj*, kompilita de li kaj de prof. Liu Zhengkun.

La fondo de la Kleriga Bazo de Esperanto en la urbeto Wafangdian signifas la komencon de E-instrua Jaro 2007 de LEA, laŭ ties dua Kvinjara Laborplano por la 21a jarcento. Nun la estraro de LEA estas streĉe laboranta por E-kursoj en kelkaj universitatoj en la nova semestro en marto 2007.

**Wu Guojiang**

#### Voĉdonemaj esperantistoj

Populara viena tagĵurnalo *Der Standard* pasintjare okazigis en sia ret-paĝaro (<http://derstandard.at/?url=?id=2375931>) voĉdonadon “Kiu lingvo por Eŭropo?”

*Der Standard* proponis elekti unu el la kvar naciaj (angla, germana, hispana, franca) kaj unu internacia (Esperanto) lingvoj. Oni povis voĉdoni ankaŭ favore al la konservo de la plurlingveco aŭ doni sian voĉon al alia lingvo.

Je 22 feb estis ricevitaj 10 mil 12 voĉoj, klare favoraj al Esperanto:

Esperanto	6411 voĉoj	64.0%
Germana	1228 voĉoj	12.3%
Angla	1095 voĉoj	10.9%
Franca	792 voĉoj	7.9%
La gepatraj	278 voĉoj	2.8%
Alia lingvo	107 voĉoj	1.1%
Hispana	101 voĉoj	1.0%

La Estraro de EEU proponis al landaj asocioj fari similan voĉdonadon por montri “kian efektivan forton kaj politikan subtenon havas la ideo pri la internacia lingvo en Eŭropo?”

En la reto oni trovas aliajn voĉdonadojn, en kiuj Esperanto aperas.

Ekzemple, en la retejo [www.icm.sk](http://www.icm.sk) de la Informcentro de junularo en Slovakio, oni respondis al la demando: “Ĉu vi bonvenigus se la komunik-lingvo de EU iĝus Esperanto?” Estis 201 respondoj

Por	44%
Kontraŭ	32%
Neŭtrale	22%

En la retejo [www.freewebs.com/international-languages](http://www.freewebs.com/international-languages) oni respondis al la demando: “Kiu lingvo devas esti la oficiala komuna lingvo de la mondo?” 2506 respondoj (ŝajnas, ke pli multe) estis ricevitaj.

Oni povis voĉdoni aŭ por etnaj aŭ por planitaj lingvoj. Pli multaj voĉdonis por planlingvo.

Inter tiuj, kiuj elektis planlingvon, Esperanto dominas:

Esperanto	1764 voĉoj	81%
Interlingua	100 voĉoj	5%
Ido	82 voĉoj	4%
...		

Alia planlingvo 72 voĉoj 3%  
Inter tiuj, kiuj elektis etnan lingvon, la angla havas 23%:

Angla	215 voĉoj	23%
Portugala	85 voĉoj	9%
Franca	74 voĉoj	8%
Hispana	66 voĉoj	7%
Rusa	47 voĉoj	5%
...		

Alia etna lingvo 243 voĉoj 26%

**AIKO**

## En la Jerusalema Libro-Foiro

18–23 feb pasis en Jerusalemo la 23a Internacia Libro-Foiro. Ĉi tiu granda evento, okazanta ĉiun duan jaron ekde 1963, altiras milojn da vizitantoj. Ĉi-jare prezentigis pli ol 1200 eldonejoj, kaj unu salono estis rezervita por fremdlingvaj libroj, kie ekspoziciis eldonejoj el plej diversaj landoj de Eŭropo (eĉ Norvegio kaj Pollando), Sud-Ameriko kaj araba mondo (Maroko, Egiptio, Jordanio). Sume la Foiro enbrakumis pli ol 40 landojn.

Ĝuste en tiu internacia salono, Esperanto-Ligo en Israelo (ELI) prezentis en aparta budo la Internacian Lingvon kaj ties kulturon (lastan fojontio okazis en 1999, antaŭ la 85a Universala Kongreso en Tel-Avivo). La Esperanta pavilono fariĝis unu el la plej aktivaj kaj multe vizitataj en la internacia salono, aparte danke al la abundo da materialoj prezentitaj. Sur la bretoj de la pavilono la vizitantoj povus vidi tradukojn de trezoroj de la monda kulturo (de la Biblio kaj Korano ĝis la *Eta Princo*), profesiajn gvidlibrojn en Esperanto, la Jarlibron apud *Esperanto en Perspektivo* kaj *Pasporta Servo*, tradukojn de famaj israelaj kaj hebreaj aŭtoroj, antologiojn, Esperanto-revuojn el la mondo, vortarojn kaj komiksojn. Oni povus impresiĝi de la muziko — origine Esperanta aŭ tradukita el la hebrea, de la plej diversaj kursoj ofertataj, kaj de manifestiĝo de 120 jaroj de Esperanto per la novaj israelaj poŝtmarko, medalo kaj telefon-karto.

En la pavilono konstante deĵoris almenaŭ du-tri esperantistoj, kaj entute volontulis por la Foiro 12 aktivuloj de ELI. La pavilonon laŭtakse vizitis ĉirkaŭ mil homoj, plejmulto da kiuj prenis informilojn pri Esperanto kaj la Esperanto-kurso en Jerusalemo, kaj pluraj aĉetis elektronikan hebrean kurson aŭ la Unuatagan Koverton de la ĵus emisiita israela poŝtmarko okaze de la 120-jariĝo de Esperanto. Estis venditaj kelkaj dekoj da kompaktdiskoj kun diversaj Esperanto-kursoj.

Ĵaŭde (22 feb) okazis la kulmino de Esperanta agado en la Foiro: publika prelego de Amri Wandel pri “Zamenhof kaj Esperanto: la historio de la internacia lingvo”, altirinta 40 vizitantojn kaj dek esperantistojn. La prelego aperis en la oficiala retejo de la Foiro kaj estis reklamita per flugfolioj disdonitaj dum la Foiro. Ĝi daŭris iom pli ol unu horon. Krome, intervjuoj kaj raportoj aperis en reta elsendo (en kvar lingvoj), en la juda usona ĵurnalo



**Jerusalemo:** aktivuloj de ELI ĉe la Esperanto-pavilono (de maldekstre): Amri Wandel, Josef Shemer, Gian-Piero Savio, Cvi Sholt, “Reĝino” (Malka Zemeli), Adam Reizen.

*World Jewish Digest*, kaj en longa raporto en loka televido.

Amri Wandel, la ĉeforganizanto de la pavilono, renkontis la faman israelan verkiston Amos Oz (aŭtoron de *Rakonto pri Amo kaj Mallumo*), kiu antaŭ sep jaroj estis invitita al la honora komitato de la UK en Tel Avivo, kaj donacis al li la israelan kompaktdiskon *Bonvenu Paco*. Oz subskribis la Unuatagan Zamenhof-Koverton.

Krome, Wandel partoprenis publikan konferencon pri la kampanjo *Reskribo de la Biblio* (<http://www.bible-valley.org>), kiun inaŭguris Ŝimon Peres kaj la ministro pri eksteraj aferoj en la unua tago de la Foiro, skribante verson en Esperanto el la libro Jesaja. Cetere estis diskutita kun Amos Rolnik, la direktoro de la projekto, la ebleco lanĉi kampanjon “Reskribo de la Biblio en Esperanto”.

La publiko montris grandan interesigon pri la Internacia Lingvo kaj la aktivuloj de la pavilono varbis dum la Foiro kelkajn lernantojn por la nova kurso en Jerusalemo, kaj aldone multajn apogantojn, kreante informadan impeton kiu ankoraŭ eĥos en la proksimaj jaroj.

**Sergej Tyrin, Amri Wandel**

**Ĉi tiu estas la 149a Ondo, kiun ni eldonis. La aprila Ondo estos jam la 150a. Bona preteksto por rigardi antaŭen kaj malantaŭen. Vi povas kontribui al la jubilea kajero per respondo al la demando: “Kial mi legas La Ondon?”. Dankon!**

## Forto kaj malforto de nia movado

La jam kelkjara vulkana Esperanto-agado en Herzberg, kiun la urbestro proklamis “Esperanto-urbo” ne haltas. Okazis en ĝi dum la unua februara semajnfino nova Studsesio — la 32a en la serio — pri Esperanto-kulturo.

Antaŭ dekkvino da grandparte junaj aktivuloj la ĉeftemon enkondukis Peter Zilvar (Germanio), skizante la faktan kaj potencialan kunligon de Esperanto kun diversaj kampoj de kulturo. En alia prelego Zilvar prezentis diversajn iniciatojn pri Esperantokomunumoj kaj la kuriozan proponon de Zamenhof pri akciaj kompanioj por disvastigo de Esperanto.

Stilistikon detale analizis Dirk Bindmann (Germanio), kiu citis kelkajn plej elstarajn stilistojn, ek de la fruaj Zamenhof, Kabe kaj Privat ĝis la postaj Lapenna, Piron kaj aliaj.

Sekvis debatoj kaj prelegoj, en kiuj lastaj Gian Carlo Fighiera (Italio) pri-traktis la strukturon de la Esperanta movado, ĝiajn fortojn kaj malfortojn (respektive neŭtralecon kaj administrismon) kaj la Universalajn Kongresojn, difinitajn “Monda respubliko inter soleno kaj kaoso”: fine li priskribis la emociajn celebroy en Boulogne-sur-Mer pri la unua UK en 1905.

En cerboŝtorma instigo Veronika Acsádi (Hungario) stimulis la partoprenantojn proponi novajn iniciatojn en la Esperanto-urbo: kelkaj el la ideoj estas tuj aplikeblaj, dum aliaj nur post modifoj povos realiĝi.

**ICH**

## Vintra sesio en nova loko

La kvara sesio (27 jan – 2 feb 2007) de la nuna grupo de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj ĉe la universitato Adam Mickiewicz (Poznań, Pollando) okazis en nova loko Collegium Novum, kien transloĝigis la Lingvistika Instituto de UAM.

17 gestudentoj el 10 landoj partoprenis la prelegojn kaj ekzamenojn kun daŭra interesiĝo. Aleksander Korjenkov prelegis pri la historio de esperanto-movado, aldonante novajn informojn al la materialo de sia libro. Aleksander Melnikov gvidis kurson pri pragmatiko kaj lingvokulturologio, li prezentis multajn amuzajn ekzemplojn pri la lingva personeco de tipa esperantisto. Tiklajn demandojn de esperanta gramatiko (kiel vortfarado, evoluo de esperanto, ekzisto de frazeologio, seksismo en la lingvo, ktp.) kaj leksikografion traktis Ilona Koutny. Ankaŭ Zbigniew Galor kontribuis per prelego pri lingvo kaj socio. Marc Bavant (akademiano) alparolis pri terminologia agado kaj proverbaro.

Meze de la semajno okazis la kutima komuna vespero kun kantoj de Zuzanna Kornicka kaj dancado. Post la plenŝtopita semajno, parto de la kursanoj vizitis Malborkon, kie ili spertis interesan gvidadon tra la fama kavalira kastelo kaj vespere la gastamon de la lokaj urbaj instancoj.

**Ilona Koutny**

## Internacia pedagogia kurso

En Bydgoszcz (Pollando) 1–11 feb okazis tradicia Internacia Pedagogia Esperanto-Kurso, kiun partoprenis ĉefe gestudentoj el kvar kontinentoj de Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz. La 15 kursojn

gvidis diverslandaj fakuloj. Estis prezentitaj videofilmoj pri Cseh-instruado, krome *Mazi en Gondolando*, *Esperanto, pasporto al la tuta mondo* kaj *Esperanto per rekta metodo*.

La kursaron kompletigis vesperoj kun interesa muzikprogramo de afrikaj studentoj kaj filmoj pri vojaĝoj kun *Esperantotur* de Romuald Puciul. Dank' al finekzamenoj estos 38 novaj lektoroj de Esperanto por Senegalio, Tanzanio, Kamerunio, Zimbabvo, Ĉinio, Mongolio, Uzbekio, Albanio kaj Pollando. Krome pliaj 19 ĉinaj studentoj aliĝis por AIS-studado en AIS-Klerigejo Bydgoszcz.

Nun eblas aliĝi al la 32aj Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz kun la 26a Pola AIS-Sesio kaj la 31a AKB-Sesio kaj kurso de Esperanto-vojaĝgvidantoj, kiuj okazos en Bydgoszcz 23 mar – 1 apr 2007.

**ICTK**

## Oblata renkontiĝo en Varsovio

20 jan 2007 okazis en Varsovio oblata renkontiĝo kun ĉirkaŭ 30 personoj el Varsovio kaj aliaj lokoj.

La Sanktan Meson en Esperanto kuncelebris pastro Roman Forycki kaj pastro Stanisław Stolz. Poste la partoprenantoj transiris al la salonego, kie post la mallonga preĝo gesamideanoj rompis oblatojn, interŝanĝis la bondezirojn, kantis Kristnaskajn kantojn, prezentis poemojn pri Kristnaska periodo kaj aliajn, interparolis, aŭskultis informojn. Ne mankis ankaŭ trinkaĵoj kaj dolĉaĵoj.

Oni spektis belan kaj interesan ekspozicion bonege preparitan de Bohdan Wasilewski, kiu kun sia edzino Krystyna prizorgis la tutan aranĝon en la gastama klostro de la fratulinoj.

**Bogusław Sobol**

## En la lulilo de l' homaro

Internacia Klubo *Esperantotur* 11–30 jan 2007 aranĝis vojaĝon en Afriko. La grupo startis el Varsovio tra Amsterdamo al Kartumo kaj atingis Adis-Abebon — la ĉefurbon de Etiopio.

Etiopio estas federacio de 9 provincoj, el kiuj 5 etnaj, kaj oni parolas tie ok ĉefajn lingvojn (el entute 83 lingvoj kaj pli ol 200 dialektoj). Etiopio jam en la kvara jarcento akceptis kristanisman, kiel la dua lando, post Armenio, sed kun sia propra Ortodoksa Etiopia Eklezio. En la Nacia Muzeo de Etiopio ni vidis skeleton de la aŭstralopiteka virino Lucy, kiu vivis antaŭ 3,2 milionoj da jaroj — pro tio Etiopio estas rekonata kiel la lulilo de la homaro.

Duonon de la vojaĝo ni dediĉis al rondvojaĝo tra Norda Etiopio — kie plej multas antikvaĵoj — rigardante unikajn pejzaĝojn kaj abismojn (pro tio iam la lando nomiĝis Abisenio). Plie ni veturis tra kanjono de Blua Nilo, vizitis en la granda lago Tano la komencan elfluejon de Blua Nilo kaj akvofalojn, kaj du belegajn monaĥejojn sur insuloj de Tano. Estis vizititaj ankaŭ la malnovaj ĉefurboj Gonder, Aksum (fama pro la legenda reĝino Saba) kaj Mekele. Fine ni atingis la etiopian Jerusalemon — montaran urbeton Lalibella — faman pro dek unu rokĉielaj preĝejoj, konstruitaj dum 12–13 jc. De Lalibella tra Dessa kaj Komolĉa ni fermis la rondvojaĝon en Adis-Abebo.

Sekve ni startis al islama parto de Etiopio: unue, al Harar — urbo kun 99 moskeoj, la kvara sankta urbo de islamo post Mekko, Medino kaj Jerusalemo. Ni daŭrigis al la dua plej granda urbo de Etiopio, Dire Dava, de kie, pro nuligo de trajno, ni dum 15 horoj busvojaĝis ĉ. 400 km tra katastrofaj rokvojoj al Ĝibutio.

Plej impresis sala lago Asil, situanta je 153 metroj sub la marnivelo, kie somere temperaturo atingas +60°C kaj eĉ nokte preskaŭ +50°C.

Ĝibutio pro altaj prezoj (similaj al la francaj) valoras viziti nur dum mallonga tempo. Tie 600 mil loĝantoj uzas la francan kaj araban lingvojn. Ĝibutio estas strategia bazo kun armeoj de Ĝibutio, Francio kaj Usono.

Dum 18 tagoj, veturante pli ol 4000 km, el kiuj duone tra neasfaltitaj vojoj, ni vizitis parton de iama Lando de Puntio, kiu komercis dum 3500-2000 jaroj a.K. kun Egiptio, utiligante la Ruĝan Maron.

**Andrzej Grzębowski**





## Argenta Poludnica

Esperantistoj — vojaĝantoj kaj turistoj — jam la dudek kvinan fojon renkontiĝis en slovaka montaro Nízke Tatry (Malaltaj Tatroj) je Esperanta okazaĵo *Poludnica 2007*. La renkontiĝo efektiviĝis 4–7 jan 2007 en la civito Liptovský Ján kun 78 partoprenantoj el dek landoj.

Dum la kleriga parto de la renkontiĝo prelegis 11 esperantistoj pri la bicikla vojaĝo *Sukcena Vojo*, Mont-Kabana Renkontiĝo, Aŭstralio, Barato, Nepalo, Kosovo, Kanado, grotaj kaj aliaj vojaĝoj kaj esperantistaj okazaĵoj en la tuta mondo.

La ĉefa programero estis ascendo sur la montopinto Poludnica (1 548 m). Sur la monton supreniris 49 esperantistoj kaj simpatiantoj de 4 ĝis 68 jaroj. Malgraŭ malbona vetero la etoso estis kora. La partoprenantoj tradicie plukonstruis Esperanto-obon. Ĝis nun estis en Esperanto-obo 550,36 kg da ŝtonoj. Ĉi-jare oni suprenportis 70,53 kg da ŝtonoj el diversaj anguloj de la mondo. Miroslav Papaj suprenportis la plej pezan ŝtonon (25 kg) dum nia tuta historio.

Inter akompanaj programeroj estis vizito de la groto Demänovská kun Esperanta ĉiĉerono (D. Hofereková), vizito de la natura muzeo Vilaĝo de Liptov-regiono en civito Pribylina, kie la partoprenantoj vidis ZEO-jn: Esperanto-arbon (acero) kaj hotelon *Esperanto*.

Post la riĉa programo la partoprenantoj refreŝiĝis en termalaj akvoj en civito Bešeňová kaj Liptovský Ján.

La 26a *Poludnica* okazos 3–6 jan 2008.

Jano Vajs

## Ne semajno, nur semajnfino

Konferenco de Kaliningrada Regiona Esperantista Unuiĝo (KREU), okazinta 10 feb en Kaliningrado, decidis nuligi la 4an Baltan Esperanto-Forumon, kiu devus okazi en Kaliningrado 21–26 jul 2007, ĉar pro gravaj sanproblemoj kaj/aŭ granda profesia premo la ĉefaj aktivuloj de KREU apenaŭ povos organizi tutsemajnan internacian Forumon je alta nivelo.

Tamen, por soleni la 100-jariĝon de la organizita Esperanto-movado en la urbo, KREU okazigos en Kaliningrado 17–19 aŭg pli modestan semajnfinan renkontiĝon *Sukcena Ondo*. En la programo: festkunveno kun partopreno de diplomatoj kaj ĵurnalistoj, gazetara konferenco, jubilea ekspozicio, interkona vespero, tuttaga ekskurso en la Kurŝa Terlango (kun pikniko), konatiĝo kun Kaliningrado, festa bankedo en restoracio.

KREU

## Perspektivoj pri Esperanto

Kadre de la simpozio *Perspektivoj pri Esperanto* 3 feb 2007 en Hago prelegis Wim Jansen (Vorton post vorto tra la historio de Esperanto), Petro De Smedt (Vortaraj Perikloj), Ziko van Dijk (Problemoj de la Esperanto-historiografio) kaj Gerrit Berveling (Esperanto kaj ĝia kulturo). Fine de la simpozio kaj por konkludi, okazis ronda tablo sub la gvido de Ed Borsboom.

La simpozio okazis en la Andreo Cseh-Domo, sidejo de la Internacia Esperanto-Instituto kaj al ĝi aliĝis 21 personoj el Belgio, Meksiko kaj Nederlando.

Atilio Orellana Rojas

## Kurte

★ En la dua semajno de februaro ILEI k UEA estis reprezentitaj de Márta Kovács en interregistara forumo “Komuna Eŭropa Referenckadro pri lingvoinstruado kaj lingva taksado” organizita de la Konsilio de Eŭropo en Strasburgo (*Libera Folio*)

★ Tanzania e-isto Mramba Simba reprezentis la Asocion de Verduloj E-istaj en la Tutmonda Kongreso de la Verd(parti) Junularo k en la Monda Socia Forumo, kiuj okazis en januaro en Najrobio. (AVE)

★ Nakata Hiroshi, la urbestro de Jokohamo, akceptis esti Honora Prezidanto de la 92a UK. (LKK)

★ La Esperanta PEN-Centro estas akceptita kiel partoprenanto en la unua Internacia Kongreso de Verkistoj k Literaturaj Tradukistoj, okazonta en Stokholmo somere 2008. (HeKo)

★ En la germanlingva romano *Grüner Engel, blaues Land* de Dagmar Leupold, unu el la ĉefroluloj estas historiisto verkanta biografion de Zamenhof, k la rakonto okazas en iama “Neŭtrala Moresnet”, E-ŝtato apud Aachen. (Esper-German)

★ En la jaro 2006 Internacia E-Muzeo en Vieno havis 5025 vizitantojn, kompare kun 3098 en la jaro 2004 — pro la plurmonata translokiĝado ne eblas kompari kun 2005. (APA)

★ 15 dec en pedagogia biblioteko de Szczytno (Pollando) estis malfermita E-ekspozicio, preparita helpe de e-istoj el Olsztyn. (*Pola Esperantisto*)

★ Norvega E-Ligo, ricevinte instigon de UEA kontribui al kampanjo proponanta UEA por la Pacpremio de Nobel 2008, konsilis al UEA nuligi la kampanjon, ĉar “pli valorus konkreta laboro por pli vasta uzado de Esperanto, ekzemple en nova porpaca aktiveco”. (NEL)

★ Fine de januaro japano Hori Yasuo gvidis unusemajnan ĉiutagan E-kurson en la Filipina Normala Universitato (Manilo) k renkontiĝis kun aktivuloj de EAF, fondita pasint-septembre. (Landa Agado)

★ Takeuti Yosikazu, forpasinta aŭtune 2005, testamentis al la E-movado dek milionojn da japanaj enoj (ĉ. 64 mil eŭrojn); oni dividis la sumon por donaci al Takatuki-a E-Societo, Kansaja Ligo de E-Grupoj, UK-fondaĵo de JEI, Azia Fondaĵo de UEA k SAT. (Espero.com.cn)

★ La Estraro de UEA nomumis s-ron Mukunda Raj Pathik Wagle la unua ĉefdelegito por Nepalo, laŭ la propono de Nepala E-Asocio (NEspA), kiu pasintjare estis akceptita kiel aliĝinta landa asocio de UEA. (GK UEA)



## Altaj privilegioj mortas malrapide

(Vide el Bruselo) Dum jardekoj ĵurnalistoj en Bruselo ĝuas privilegiojn pro tio, ke ili raportas pri la interna politiko de la Eŭropa Unio, kutime ne tre interesa por modestaj civitanoj. La privilegioj, de malmultekostaj flugoj kaj biero ĝis gazetaraj “stud”-vojaĝoj estas eĉ nun tre bonvenaj ĉe la kolegaro. Ankaŭ laborante, la ĵurnalistoj ĝuas bonajn kondiĉojn en la Eŭropaj instancoj. Unu el la privilegioj estas lingva: ĉiumerkrede dum la semajna gazetara konferenco estas interpretado en ĉiujn 24 lingvojn. Ofte, la interpretistoj laboras por neniu, ĉar kial aŭskulti interpretadon, kiam ĉiuj uzas la anglan aŭ, ĉiam pli malofte, la francan?

Pro tio ke la privilegioj estas tiom bone fiksataj en la mensoj de la ĵurnalistoj, estis nekredible, ke la nuna prezidanto de EU, Germanio, ne sekvis la tradicion. Alparolante la Eŭropan Parlamenton, Angela Merkel uzis la germanan, kaj ŝia gazetara servo, je kosto de la germana impostpaganto, disponigis tradukon en la franca kaj angla kiel “kutime”. Kompreneble la ĵurnalistoj ankaŭ disponis — je kosto de ĉirkaŭ 1000 eŭroj po lingvo al la Eŭropa impostpaganto — pri interpretado en ĉiuj 24 oficialaj lingvoj. Tamen kiu freneze skribus interpretadon, kiam disponeblas facile kopipreta teksto? Tial la Internacia Asocio de Ĵurnalistoj alportis “gravan” problemon al la atento de la germana ambasadoro en Bruselo, Doktoro Wilhelm Schönfelder.

“La franca kaj angla versioj estis je la dispono de la ĵurnalistoj en la Strasburga gazetara ĉambro nur post 24 horoj, sed tio estis tro malfrue”, — klarigis al la germana ambasadoro Lorenzo Consoli, prezidanto de la Asocio. Consoli, itala membro de la malnova lernejo de ĵurnalistoj, longe loĝas en Bruselo. Li neniam lernis la germanan aŭ la lokan lingvon, la nederlandan, kaj prefere komunikas france. “Ni volas substreki, ke la komplikeco de la prezentado, malgraŭ la bonaj laboroj de la parlamentaj interpretistoj, malfaciligis taksadon de la subtileco de la prezentado”. Consoli prezentis aliajn okazojn, kiam la germana prezidanto de EU ne ĝustatempe aŭ eĉ tute ne disponigis tradukon. “Tiu incidentoj ŝajnas kontraŭ bone starigitan tradicion sekvitan de ĉiuj antaŭaj prezidantecoj, inkluzive de la antaŭaj germanaj”. Consoli esperas ke la “problemoj” ne ripetigos.

“Mi tre bedaŭras la malfacilaĵojn, kiujn la membroj de la internacia gazetaro devis alfronti dum la unuaj tagoj de la germana prezidanteco de la Eŭropa Konsilio pro tio ke ne ĉiu informo disponeblis en la franca kaj la angla ekde la komenco”, — respondis ambasadoro Schönfelder, ne sen humoro. “Ni prenis zorgon noton de viaj praktikaj rimarkoj. Ĉi-momente, ĉiuj proceduroj estas reviziataj, evoluigataj kaj, se necese, ŝanĝataj por sekurigi ke ĉiu informo estis disponebla en la tri lingvoj tiom rapide kiom eblas”.

Dafydd ab Iago

La eseo de Joxemari Sarasua (LOdE-148) pretekstas recenzon, sed en vero aglomeras aron da iom subjektivaj, sed tial tamen ne seninteresaj, personaj pensoj.

1) Se la traduko de Melnikov estas “rekte virtuoza”, utilas tion elmontri per konkretigoj, ekz. en kio ĝi superas la version de Nekrasov el 1931. La malkontento pri ĉi-lastata certe estis unu el la melnikovaj motivoj. (Min movis simila impulso, ĉe la refaro de *La Rabeno de Bacherach* (Heine), *La metamorfozo* (Kafka) kaj *Songĝeskoj* (Schnitzler), kiam mi trovis la tradukojn de Zamenhof, Nervi kaj Duc Goninaz jen eksmoda, jen fuŝa, jen tro sterila.)

2) Iom tro ŝablonas degradi klasikaĵon al nura stuco kaj straso libro-breta. Kion do diri pri t.n. modernaj klasikaĵoj centmilope represataj kaj tradukataj (Hesse, por ekzemplo).

3) Sarasua iom tro surface klasas miajn tradukojn “deknaŭ-jarcentaj romantikaĵoj, foje amuzaj”. Nu, nenio sekolas deknaŭe ĉe Goethe, Schiller, Lessing, Schnitzler, Breyer, Kafka kaj (baldaŭ) Huch. “Romantika” (laŭ la epoka, ne laŭ kiĉ-komprena senco) estis nur Eichendorff kaj certe li estis neniam amuzisto.

4) Nia recenzinto postulas tradukojn el, ekzemple, Handke kaj Grass (ĉi lastan tradukis ... polo, Böll iĝis viktimo de R. Schulz). Li pretervidas ion duoblan: la afinecon kun tradukota aŭtoro (li mem juĝis ĝin grava ĝis tia grado, ke la svisan aŭtoron Keller li bon-volis altigi al la rango de gejo kaj, pro amo al kandelo, ankaŭ ties tradukinton) kaj la demandon pri akiro de aŭtoraj rajtoj. Handke min tuŝas kiel akvo anseron, Grass kaj Böll obsediĝis de milit-komplekso (la unua riveligis eĉ SS-viro) kaj tiajn tedaĵojn mi ne kapablas legi, des men traduki.

5) La demando pri traduk-postulato intime ligiĝas al literatura recepcio\* ekster la koncerna lingvo. Oni ne pretervidu, ke tion kundirektas la eldon-industrio, t. e. ke merkataj interesoj venas antaŭ propre diritaj literatur(histori)aj kriterioj. La furora *La parfumo* de Süsskind konfirmas tion. Pro stila-lingvaj konsideroj ĝi defius tradukunton, sed Esperanta versio estus nur unu plia.

6) La selekto-kriterioj ne limiĝu, konsentite, al prestiĝa-propaganda aspekto (ankaŭ ni havas la Biblion, Koranon, Ŝekspiron...), sed konsideru krome la perantan kaj vehiklan funkcion de traduko. Mi ĝojas, ke Kalocsay ebligis al mi enrigardi la hungaran, Dresen la estonan, Sarasua la eŭskan, Li Shijun la ĉinan... kaj se, por ekzemplo, mia traduko el Fontane (*Sub la pir-arbo*) pro neekzisto de ali-lingvaj, portus plezuron al mia “trupo da legantoj” — kion plian mi volas? Legiojn (ju pli multaj, des pli stultaj, diris Grosjean-Maupin) certe ne. Se tiel, Sodomo, Gomoro kaj Esperantujo ankoraŭ ne perdiĝis...

**Reinhard Haupenthal**

\* **recepti|o** (D Rezeption, L receptio, E reception). La atento al kaj komprena akcepto de art-verko per rigardanto, leganto aŭ aŭskultanto; ~a estetiko; ~historio.

*Ni sendas gratulojn kaj bondezirojn*  
al **Stasys Kružinauskas** (Vilkaviškis, Litovio),  
kiu 50-jariĝis la 13an de februaro  
al **Nadejda Ŝeludjko** (Jekaterinburg, Ruslando),  
kiu festis sian Oran Jubileon la 17an de februaro  
al la membroj de la **Finnlanda Esperantista Junulara**  
**Organizo**, kiu iĝis 30-jara la 26an de februaro.



## Ankoraŭfoje pri Radio Polonia...

Doloriga estas la afero. Bedaŭrinde, polaj homoj, kiuj normale pensas, vidas, kio nun okazas en la lando, des pli kiam regas la nova registaro dank' al la apogo en la parlamentaj balotoj de ekstremaj nacionalistoj kaj antisemitoj. Tiuj ĉi homoj volas havi siajn homojn en ĉiuj la plej gravaj institucioj, do ankaŭ en radio. Eĉ en la unua programo de Pola Radio nun laboras redaktoro, konata pro antisemitaj felietonoj en Radio Maria, kiu pro tiuj ĉi paroladoj estis juĝita, sed ne punita, nur kiel "la premion" ricevis laboron en la ŝtata radio kaj nun povas esprimi la opiniojn en la unua programo de Pola Radio. Do mi ne tute miras, ke ankaŭ en Radio Polonia komenciĝis "silenta" antisemita batalo.

Ja Esperanto-redakcio de Radio Polonia ricevadis la plej multajn korespondataĵojn el ĉiuj eksterlandaj redakcioj. Ĉu tion oni ne vidis? Certe jes, sed la vero pikas en okulojn. Do estro, kiu respondecas pri tiuj programoj, esprimante sian opinion pri Esperanto, konvinkis min ankoraŭ pli forte, kiel antisemitaj estas nun en Pollando tiuj, kiuj okupas la gravajn postenojn.

Mi ne legis la opinion de s-ro Piotrowski el Varsovio, sed se vere li defendas tiujn agojn de la homoj, kiuj stultaĵojn parolas pri Esperanto, do mi miras, ke li estas esperantisto kaj eĉ prezidanto de Varsovia filio de PEA. Ne unu foje mi aŭdis, ke Esperanton elpensis judo, ke estas juda lingvo ktp ktp. Nun tiuj ĉi homoj jam ne devas esprimi siajn opiniojn kaŝite. Mi ne estas certa ĉu Bjalistoko sukcesos organizi UK. Eble? Mirakloj okazas.

**Antoni Chwej** (Pollando)

## Rajto per Esperanto

Koncerne la leteron de Lech Piotrowski (LOdE-147): Tia persono, kiel aliaj samspeculoj, tute miskomprenas *la veran* rolon de Esperanto. Jam Zamenhof tre frue akcentis, ke Esperanto estas normala lingvo, egale por *kiu ajn celo* ĝi estas uzata.

Kontraŭe jenaj du ridindaj ekzemploj: 1) pola pastro iam protestis pro eldono de seksamora libro en Esperanto; 2) sveda abstinenculo, ĝismorte nur balbutanta nian lingvon, diris tre naive al mi: "Vi kiu estas esperantisto *devas* membriĝi en nia abstinencula societo". (Ĝui, ekzemple vinon, babilante Esperanton, tio estas tute privatrajta kombino).

Se oni vere volas atingi renoman, prestiĝan pozicion por Esperanto, oni devas nepre pruvi ĝian glatan funkcion sur *diversaj* kampoj. Ligi Esperanton dogme al, ekzemple, puritanaj celoj, estas nur privata tasko, nenio alia. Ofte swingi verdstelajn flagojn, aŭ interŝanĝi insignojn, tiamaniere sufiĉas *mal*granda vortprovizo kio *mal*imponas al eksteruloj. Sektecaj agoj nur kondukas al konstanta stagnado. Mi larĝ-horizonte restas abonanto de *La Ondo*.

**Bertil Englund** (Germanio)

## Bonvolu korekti

Oni ne ĉiam facile povas tralegi la manskribitajn nomojn kaj adresojn, sur konkurso-slipoj, kaj, se mankas retroŝta adreso, la sekretario foje ne ĝuste transskribas ilin.

Bonvolu korekti en la februara *Ondo* du nomojn de laŭreatoj en la februara komuniko pri la 9a Fotokonkurso: la unuan premion ricevis Maurizio Bresnik kaj la trian — Ronaldo Bijtenhoorn.

Mi petas pardonon de la laŭreatoj kaj de la legantoj.

**Halina Gorecka**

## Draste fremdaj al etoso de esperantismo

**Respondo al tiuj, kiuj arogas al si la rajton decidi, kiu estas bona esperantisto.**

La Varsovia Filio de PEA estas kaj devas esti organizo politike neŭtrala, inter ĝiaj membroj estas apogantoj kaj kontraŭuloj de la registaro kaj politikaj indiferentuloj. Neŭtrala politike organizo rajtas neaboni politike malneŭtralajn revuojn (eĉ tiel altnivelajn kiel LOdE) kaj preferi aboni neŭtralajn kaj mi miras, ke tiela evidentaĵo povas iun mirigi.

La aroganta sugesto, ke esperantistoj apogantaj la registaron ne estas fidelaj al idealoj de Zamenhof kaj sekve, ke ilia esperantisteco estas dubinda, estas simptomo de maldemokrata, sekteca pensmaniero kaj maltoleremo draste fremdaj al etoso de esperantismo.

Politika neŭtraleco ne signifas kompreneble, ke E-organizoj ne devas reagi al kontraŭesperantaj agoj. La Varsovia Filio de PEA akre protestis kontraŭ la likvido de E-elsendo de PR en la leteroj al Ministerio de Eksterlandaj Aferoj kaj Ministerio de Kulturo.

En la artikolo de s-ro Dario Rodriguez (LOdE-148) ĉiuj riproĉoj kontraŭ pola registaro estas malpravaj. Pola registaro havis nenion komunan kun la polica persekuto al geja manifestacio en Poznań, ne preparas kontraŭ-abortiĝan leĝon kaj ne intencas enkonduki mortpunon. Tamen eĉ malpravaj akuzoj indas je respondo kaj diskuto. Insultaj — kontraŭ kiuj mi protestis — ne.

**Lech Piotrowski** (Pollando)

## Leterkesto

Mi ŝatas legi *La Ondon*, kvankam iom tedas min legi la kurtraportojn pri diversaj esperantoaranĝoj. Tamen ili valoras. Mi tre ŝatas la multflankan enhavon de *La Ondo*, ekzemple raportojn pri EU kaj esperanto, pri La Civito, pri rokmuziko, pri Afriko kaj pri la Akademio. Mi ankaŭ volonte studas debatojn, recenzojn kaj novelojn.

**Jarlo Martelmonto** (Svedio)

Pro ideologia ofensivo kontraŭ Pollando eksterlande, kiun mi konstatis ankaŭ en via revuo, mi rezignas pri abonado.

**Kristoforo Ŝliwiński** (Pollando)

Estas tre agrable sperti, kiom bele via magazino evoluas aspekte, enhance, aperritme, eldonkvante... Sur ĝiaj paĝoj ĉiam ondas pasiaj diskutoj kaj disputoj pri la aktualaj aferoj de niaj lingvo kaj movado.

Sen ajna dubo *La Ondo* nun apartenas al la plej altnivelaj (kaj nemalhaveblaj!) "ondoj" en la maro de E-periodaĵoj. Gratulojn kaj novajn sukcesojn al ties redaktantoj, eldonantoj, kontribuantoj, legantoj kaj subtenantoj!

**Anatoli Ionesov** (Uzbekistano)

En la decembra numero mi rimarkis erareton en la regulo de la Belartaj Konkursoj. La sama eraro plu aperas en la papera *Jarlibro* de UEA, tamen en la hejmpaĝo de UEA estas la ĝusta teksto: "Kanto (la teksto kaj melodio povas esti verkita de malsamaj aŭtoroj; la melodion oni povas sendi en kiu ajn aŭdebla maniero)". Do, nur partituro ne plu taŭgas. Eble ĝustigo en *La Ondo* povus instigi al partopreno iun verkemulon, kiu ne scias skribi muziknotojn.

**Anja Karkiainen** (Finnlando)

## Soldatoj de Esperanto kaj pacaj batalantoj



*Fine de sia regula kunsido, la komitato de Pola E-Asocio kondamnis la politikon de Germanio.*

*Fine de sia regula kunsido, la komitato de Demokrata Kongolanda E-Asocio kondamnis la politikon de Ruando.*

*Fine de sia regula kunsido, la komitato de Kuba E-Asocio kondamnis la politikon de Usono.*

*Fine de sia regula kunsido, la komitato de Helena E-Asocio kondamnis la politikon de Turkio.*

Kiu el la supraj asertoj veras? Laŭ komuniko de 29 jan 2007 de la ŝtata novaĵagentejo ACN, la komitato de Kuba E-Asocio deklare “kondamnis la kontraŭ-kuban politikon de Vaŝington”. Sekve, la aliajn pseŭdoinformojn mi mem “sen troa penado, prenus el la aero” (I. Örkény).

Oficiala klarigo de la KEA-prezidanto estas promesita, sed ĉu ĝi povos ŝanĝi la esencon? Nome, ke aliĝinta landa asocio de UEA, organizaĵo laŭstatute neŭtrala rilate al politiko, faris politikan deklaron. Ene de certaj limoj, tio evidente eblas. Laŭ la statuto, “respekto de la homaj rajtoj ... estas por la laboro de UEA esenca kondiĉo”. Protesto kontraŭ malrespekto de homrajtoj devas do eblu.

Tamen, KEA agadas en lando kie, anstataŭ serĉi ligneron en fremda okulo, pli bonus unue rimarki propran trabon. Ekzemple, forigi la sufokan malkoheron inter art. 5. de la Konstitucio (“La Komunisma Partio de Kubo... estas la supera estra forto de la socio kaj la ŝtato...”) kaj inter la alt-aspira artikolo unua: “Kubo estas... respubliko unueca kaj demokratia, por la ĝuado de politika libereco...” (miaj tradukoj). Notu ke ĉi tiel kritikis unuopulo István Ertl, ne ia reprezentanto de la politike neŭtrala UEA...

Povas esti ke plejparto de la UEA-membroj efektive kondamnas, aŭ malalte taksas, la usonan politikon ĝenerale, aŭ la rilaton de Usono al Kubo specife\*. Tio eĉ ne aparte surprizus, ĉar diversaj indikoj konkorde montras ke, politike, la esperantistoj pliparte maldekstremas\*\*, kaj ĉar en la lasta jardeko kreskis ĉe ni la emo kontraŭi tutmondiĝon, aŭ apogi “alispecan tutmondiĝon”, ofte vidante la ĉefkulpulon en Usono.

La ĉefan kulpon portas tamen la homaj konformismo, neklero kaj mensa pigro. Ĉiam pli komfortas uzi kiel ĉefajn penshelpilojn antinomiojn fascinajn pro facilu: malbono kontraŭ bono, Usono kontraŭ la mondo, anglalingvanoj kontraŭ...

Ne mankas intaj ekzemploj pri malneŭtraleco ĉe landaj asocioj de UEA. Post lego de freŝa doktoriga disertacio “pri la historio de UEA el politika vidpunkto”\*\*\*, fine malpli mirigas la malneŭtralaĵojn mem ol ke UEA malgraŭe sukcesis transsavi sin neŭtrala.

\* Indas legi: Howard Zinn: La radikoj de la politiko de Usono rilate Kubon, <http://mas-eo.org/article76.html>.

\*\* Pruvon per kontraŭo alportas la malviglo de la dekstra jahua diskutlisto malrugha\_rondo, dum membroj de la komunisma IKEK sesoble pli aktivus en sia diskutejo.

\*\*\* Sikosek M. *Die Neutrale Sprache. Eine politische Geschichte des Esperanto-Weltbundes*. Bydgoszcz, 2006.


Ĉu, profunde en nia koro, ni devas riproĉi la agantojn de KEA? Ne, ĉar en la kondiĉoj de unupartia nedemokratio, kiu emas maski realajn problemojn per — realaj — maljustaĵoj de ekstera grandpotenco, ni, sen kono de la internaj kondiĉoj, ne povas postuli ke ĝuste KEA defiu la oficialan linion politikan. (Des malpli ke iuj inter ni sincere jubilis kiam Fidel Castro sin nomis “soldato de Esperanto”.)

Ĉu ni tamen devas levi nian voĉon? Jes, ni devas, ĉar temas pri precedenco. Se ĉi-foje ni ne komentus, tiam ni devos silenti ankaŭ kiam Nialanda E-Asocio kondamnos politike Vialandon, kaj inverse.

Kaj tiam vane serĉos rifuĝon la pacaj batalantoj.

**István Ertl** (Luksemburgio)

## Samarkando en ĉiuj Kontinentoj



En aŭgusto 2007 Samarkando oficiale kaj solene festos sian 2750-jariĝon sub aŭspicioj de UNESKO. Por celebri la gloran jubileon de la mondfama urbo, la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro kaj loka Esperanto-klubo kolektas diversspecajn kaj ĉiulingvajn materialojn (gratulleterojn, vojaĝrakontojn, gazetartikolojn, librojn, broŝurojn, poemojn, kantojn, citaĵojn, fotojn, desegnaĵojn, dokumentojn ktp) pri Samarkando kaj samarkandanoj.

Ĉio pri la temo, inkluzive de fotoj kaj/aŭ informoj pri la hoteloj, restoracioj, vendejoj, stratoj, komunumoj, firmaoj, varoj, librotitoloj, artaĵoj ktp portantaj la nomon “Samarkand” aŭ simile, estos tre bonvena.

La projekto estas realigata kunlabore kun la Samarkandaj Ŝtataj Muzeoj. La plej interesajn materialojn ni publikigos en nialanda gazetar. Ĉiuj ricevitaj kontribuajĵoj estos agnoskitaj kaj eksponataj en la internacia ekspozicio en Samarkanda Ŝtata Muzeo pri Historio de Kulturo kaj Artoj de Uzbekistano. Estas ankaŭ planate eldoni specialan jubilean libron.

Anticipan dankon por via kunlaboro kaj afabla subteno.

Bonvolu adresi viajn kontribuojn laŭeble baldaŭ al Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro ✉ P.O. Box 76, UZ-140100 Samarkand, Respubliko Uzbekistano.

**Anatolij Ionesov** (Uzbekistano)

## El vintro al somero per Esperanto

Ksenia Prilepskaja, ruslanda esperantistino kaj ĵurnalistino, forlasinte la vintran Moskvon venis al la somera Suda Ameriko helpe de Esperanto kaj *Pasporta Servo*. Post *Bona Espero*, Brazilio kaj San-Paŭlo, ŝi venis en februaro al Bonaero, la ĉefurbo de Argentino.



Argentinaj esperantistoj renkontiĝis kun ŝi, gastigis ŝin, montris al ŝi la urbon.

La ruslanda kuraĝulino havas vizojn, kaj post Argentino ŝi iros al Bolivio, Peruo, Ekvadoro, Kolombio kaj Venezuelo... Eble ankaŭ al Kubo kaj Meksiko.

**Roberto Sartor**

**Sur la foto:** Roberto Sartor kaj Ksenia en Bonaero.

## Ege malbona elekto

Kris Alen skribis:

“La sagaca alegorio de s-ro Espondo aludas pri mia inkvizitora pedanteco, kiu senkolorigas la gamon de la lingvo. Ĉu aŭtente hazarda kunŝmiro de la koloroj promesas belan gamon? Kion do signifus tiuokaze la averto de poeto: *Confusion will be my epitaph?*” (LOdE-147).

Leginte la komenton pri mia satira komento pri la stilo de la kritiko kiun la vundiĝema s-ro “Ponardo” Al En (PALE) uzis je sia kritiko de PMEG, mi unue perceptis, ke s-ro PALE esprimis ian laŭdan afablecon uzante la vorton “sagaca” pri la “alegorio” de mi.

Por respondi la demandon de s-ro PALE pri la signifo de la citato el la poemo de s-ro “King Krimson”, mi ja devis vidi la tutan poemon. Leginte tiun ege pensindan poemon, mi sincere esperas, ke s-ro PALE ne intencas perforte malhelpi tiujn kiuj ne aprecas lian kritikstilon.

Krom tio mi nun komprenas, ke li fakte nomas min kaj ĉiujn, kiuj havas alian opinion ol li, “stultuloj” (fools) kaj krom tio li indikas, ke li, kaj nur li estas la homo kiu rajtas difini la regulojn por la verdula lingvo.

Bedaŭrinde la citato de s-ro PALE ankaŭ direktas miajn pensojn al potenculoj kiuj megalomanie kaj diktatore intervenis/-as en la vivo de “ordinaraj homoj” kiuj ne emis/-as konformi al iu specifa opinio.

Do mi tute ne malaprobas ke oni volas instrui/atentigi pri la reguloj de la Esperanta gramatiko. POMEKO estas unu metodo informi ordinarajn uzantojn pri la ege fleksebla gramatiksystemo de Esperanto. Eble oni ekhavas la impreson ke POMEKO estas ia “hazarda kunŝmiro” de la Esperantaj elementoj. Laŭ mi tio ne estas la kazo. Kiam mi dubas pri io mi alvokas la dokumenton rete kaj serĉas en ĝi ekzemplojn kiuj estas aplikeblaj je mia aktuala problemo. En POMEKO mi trovas ekzemplojn de la lingvouzado de “ordinaraj Esperantistoj”. Kelkfoje mi samopiniis, kelkfoje mi ne samopiniis, kaj provas solvi la problemon mem. Ne ĉiam, efektive: preskaŭ neniam, mi trovas perfektan solvon. Nu se mi estus verkanta leĝon aŭ simile gravan dokumenton mi uzus nur la “nigran koloron” (t.e. nur unun metodon/lingvostilon) por esti ege preciza. Bedaŭrinde “klareco” kaj “beleco” ne ĉiam povas loĝi sub sama tegmento.

Kiam homoj uzas Esperanton oni estas ege influata de sia gepatra lingvo. S-ro PALE opinias ke lia lingvaĵo (kiun mi perceptas ege slav-influata) estas la unu nura modelo por la verduloj. Mi havas alian lingvon kiu ege influas mian percepton pri la uzo de la elementoj en Esperanto kaj pro tio havas alian opinion pri diversaj aferoj. Tio kio gravas, kiam temas pri Esperanto, estas ke oni komprenas unu la alian, t.e. kiel eble precize elparoli la vortojn laŭ la reguloj, komprenante ke ekzistas intervalo en kiu la sono de la litero povas varii sen farigi la literon nerezonebla, metas la akcenton je la antaŭlasta silabo, uzas la finaĵojn “n” kiam tio estas necese, uzas la prepozicion “je” kiam ekestas duboj pri la uzebleco de aliaj prepozicioj, ke *-is*, *-as*, *-os*, *-us*, *-u* kaj *-i* estas verbaj tempindikiloj kiujn oni uzu por priskribi la kronologion en rakonto, memorante ke preskaŭ ĉio estas relativa en la fizika mondo. Tio signifas, ke tio kio estas as-tempo por unu homo senprobleme povas esti is-tempo aŭ eĉ os-tempo por aliaj personoj ĉe aliaj observlokoj.

Unu afero estas tute klara: la citaĵo “*Confusion will be my epitaph*” ŝajnas laŭ mi ege malbona elekto kiel komento de mia alegorio pri la kritikstilo de s-ro PALE.

**Espondo**

## La jubilea UK, ĉu en Moskvo?

La fiasko de la kampanjo por savi la esperanto-redakcion de la Pola Radio turnigis al rankoro kontraŭ la polaj aŭtoritatoj, kaj Pollando entute, kies nunan socion pluraj UEA-aktivuloj taksas antisemita, politike malstabila ktp. La vundo pro la ofendo fare de la polaj aŭtoritatoj, kiuj interalie difinis UEAn “hobia movado”, estas tiel profunda ke, post jardekoj da troigita poleco, oni malkovras la ligojn inter Ruslando kaj Zamenhof, kiu fakte neniam estis pola, sed ruslingva judo.

Tial ekaperis la propono, ke la Zamenhof-jubileo estu festata en Moskvo, urbo kie la Majstro loĝis kiel studento, kaj eĉ forte aktivis kiel cionisto, en 1879–1881. Moskvo sukcese gastigis TEJO-kongreson en 2004, kial ne ankaŭ la UEA-kongreson en 2009? Des pli ke en Ruslando (ĉu cara, ĉu sovetia, ĉu Putina) neniam okazis UK. Eĉ ne mankus la ebleco aranĝi pilgriman karavanon al Bjalistoko, kie omaĝi al la Zamenhof-monumento, bruligi kandelon je la ideo de Monda Esperanto-Centro, eventuale nazfingrumi al la “fiaj polaj aŭtoritatoj”...

Estas ankaŭ objektiva la rimarko, ke la nuna situacio interne al la pola esperanto-komunumo ne aspektas la plej oportuna por organizi Universalan Kongreson.

**HeKo**

## Akademio: eminentaj foriroj

Werner Bormann, la prezidinto; Stefan Maul, la ĉefredaktoro de *Monato* kaj gvidanto de la lingva konsultejo; Edwin de Kock, la poeto; Spomenka Štimec, la prozistino; Andrzej Pettyn, la radioredaktoro: ili ĉiuj retiriĝas de la Akademio de Esperanto, rezignante pri rekandidatiĝo fine de la nuna mandato. Tri el ili estis akademianoj dum pli ol tridek jaroj.

La kialoj estas diversaj, kaj ne ĉiam konataj. Por iuj temas pri la aĝo aŭ la sanstato; unu simple tediĝis pro la lavango da mesaĝoj en la akademiaj retlistoj. Certe ne kulpas la timo pro ne reelekto, des pli ke, por 15 postenoj de la renovigata triono, entute restas nur 16 kandidatoj: se unu plia el la elirantaj bonvolus rezigni, oni eĉ ne bezonus voĉdoni!

**HeKo**

24 jan forpasis en sia 101a vivojaro

**René Llech-Walter (1906–2007)**

aktiva esperantisto en Perpignan (Francio), estrarano de UEA (1955–1964) kaj prezidanto de UFE (1957–1967).

9 feb en Moskvo pro koratako forpasis

**Viktor Petroviĉ Grigorjev (1925–2007)**

doktoro de filologio, fakulo pri poezia lingvistiko, aŭtoro de pluraj libroj kaj artikoloj, ĉefa scienca kunlaboranto de la Instituto de la rusa lingvo, laŭreato de la premio Puŝkin de la Ruslanda Akademio de Sciencoj (1995), populariganto de interlingvistiko kaj esperantologio, eksmembro de la Akademio de Esperanto.

18 feb en Rio-de-Ĵanejro forpasis

**May Bijeveld (1910–2007)**

esperantistiĝinta en 1930 en kurso de Andreo Cseh en Nederlando, en 1938 post edziniĝo kun brazila esperantisto, ŝi migris al Brazilo, kie ŝi informis pri Esperanto, iniciatis vojaĝantan ekspozicion UTINESPO kaj akceptigis rezolucion pri Esperanto en EKO 92 en Rio.

## Heroo de lontanaj horizontoj

**Platono. *Fedono* / Trad. el la helena, antaŭpar, koment. Spiros Sarafian. — Ateno: S.Sarafian, 2006. — 120 pĝ.**

**Platono. *La apologio de Sokrato* / Trad. el la helena, antaŭpar, koment. Spiros Sarafian. — Ateno: S.Sarafian, 2006. — 85 pĝ.**

**Platono. *Kritono* / Trad. el la helena, antaŭpar, koment. Spiros Sarafian. — Ateno: S.Sarafian, 2006. — 51 pĝ.**

Meditante kun Joxemari Sarasua (LOdE-148), kiomgrade urĝas Esperanto-tradukoj de naciaj klasik-aĵoj, mi ne dubas pri la afero de Spiros Sarafian, kiu esperantigis por ni la platonan tekstaron pri Sokrato.

Ĉi-foje ne temas pri versoj, do kiu ajn lingvo taŭgas por konvene esprimi la faman filozofon. Kaj, certe, en kiu ajn lando en granda biblioteko oni trovos la necesan libron. Tamen sufiĉas, ke Sokrato kaj Platono estas personoj ne nur grekaj, sed internaciaj, por ne diri — universaj, do ne malpli ol bibliaj profetoj ili apartenas al la tuta homaro. Kaj estas tute normale, ke iliaj voĉoj resonu ankaŭ en Esperantujo. La kvazaŭ biblia historio de la morto de Sokrato, rakontita de lia fidela kaj egalglora disĉiplo, estas historio de lasta ekzameno, grandsceneja ilustrado de Sokrata metodo, tre specifa provo socia kaj personeca. Riĉa je plej diversaj aludoj — kulturaj, sociaj, politikaj, etikaj kaj filozofiaj — ĝi havas bonan ŝancon inciti nian penson, kondiĉe ke tio en principo eblas. Sendube pri tiu principa ebleco esperis nia tradukisto.

Tiuj tri verkoj koncernas la finan epizodon de la vivo de Sokrato kaj prezentas: la unua — lian parolon antaŭ la tribunalo, la dua kaj la tria — liajn konversojn kun amikoj enprizone antaŭ la ekzekuto. La skrupulaj komentoj de Spiros Sarafian multe helpas al ni eksenti la etoson de la loko kaj tempo. La ĵurio el 501 membroj juĝas la filozofon ĉefe pro ties filozofia praktiko. Sokrato ŝatas ekzameni la atenanajn. Fakte tiaj ekzamenoj iĝas senĉesaj publikaj moko/provokoj pri/de bonaj civitanoj — laborantoj fizikaj kaj intelektaj, interalie — metiistoj kaj poetoj. Ĝuste de poeto devenas la akuzo, kaj ĝin subtenas metiisto kaj retoro. Sokrato do ekzamenas publike, akompanate del amaso de riĉaj junuloj, kiuj rikanas kaj emas surstrate imiti la filozofon kun lia stilistiko de provokaj demandoj. Oni diras ankaŭ, ke Sokrato ne ŝatas la demokration kaj ne hontas laŭdi la oligarĥion de malamika Sparto. Sokrato havas do la eblon ekzameni la demokration mem. Kaj li ne deziras preterpasi tiun raran ŝancon.

Ekzistas hipotezo, ke — 400 jarojn poste — Judaso transdonis Kriston al ekzekuto por ekzameni la fidelecon de ties disĉiploj (pri kiu li dubis). Sokrato filozofie dubis pri la kapablo de *kvanto* iĝi *kvalito*, alivorte, li ne kredis pri la saĝeco de la amaso. Ne la popolo, sed la saĝuloj portas la veron, — por pruvi tion Sokrato sin prezentas al la provo. La admirinda kaj enviinda demokratio atena laborigis regulan juĝan proceduron kies mekaniko donis multajn defendajn rimedojn al persono kalumniita. Estis nature supozate, ke tiu persono ilin nepre uzos. Sokrato neglektis

la defendon kaj provokis 280 jurianojn (kontraŭ 221) deklari lin kulpa. Tio ne estis tragedio. Antaŭ la dua voĉdono la akuzito rajtis proponi sian varianton de puno anstataŭ tiu de morto. Sokrato povis proponi, ekzemple, ekzilon kaj facile deŝirus de tiuj 280 almenaŭ 30 (kio sufiĉus por eviti la ekzekuton). Oni konstatis kun konsterno, ke Sokrato tion ne entreprenis. La mekaniko demokratia faris sekvan movon laŭproceduran... kaj oni vidis kun teruro, ke ĝi ne havas garantiojn kontraŭ absurdo kiu efektiviĝis: la filozofio estis kondamnita. Sokrato estis sufiĉe parolinta pri neracieco de la popolregio. Nun li tion klare demonstris en eksperimento, kiu kostis al li la vivon.

Speciale por eventualaj Cerberoj, kiuj emas legi recenzojn kontrolante ilian lojalecon al iu aŭtoritato, mi diru, ke la ĵus-prezentitan interpreton mi pruntis nek el Platono, nek el la komentoj de Spiros Sarafian. Mia opinio, ĝi simple legiĝas el la kunteksto de la evento kies panoramon donas tiel trafte la triptiko. (Oni konsideru indulge tiun replikon tributo al la Sokrata metodo.)

La metaforo de triptiko ŝajnas konveni al nia okazo. La triptiko (en la unua senco: faldebla ikono) faldite havas sian centron fermita per la flankoj. La centra senca epizodo de nia panoramo estas certe la brava publika apologio de Sokrato, kiu prezentas al ni *homon de devoto*: “Same kiel sur ĉevalo... algluiĝas iu tabano, tiel, mia opinio, la dio algluis min al la urbo, por ke mi veku, konsilu, riproĉu ĉiun el vi senĉese” (*Apologio de Sokrato*, pĝ. 60). En *Kritono* ni vidas antaŭ ĉio stoicecan moraliston. Kaj la oratoro de *Fedono* estas tre proksima al pitagorano, esperanta per metempsikozo havigi postmortan beaton. Sed tiu reciproka ŝirmado estas efekto traira ikontransporta. Oni malfermu la faldojn kaj estu atenta. La tri bildoj donos impreson komunan unuecan. La devota fervoro ja supozas observon de la virto, kaj la strebo al agrabla senkorpigo en Hadeso ne nepre kunekzistas kun la vulgara hedohismo.

Kaj tamen kontrasto restas. Malgraŭ (kaj kun) la dolĉa fabelo pri metempsikozo. Kaj malgraŭ (kun) la perfekta trankvilo de 70-jara Sokrato. Kaj ne nur kriema kaj tute realista Ksantipa ne detenis larmojn, ankaŭ la fidemaj disĉiploj ektrinkis el la amaro



Jacques-Louis David. *La morto de Sokrato* (1787)

de la minuto kaj ekploris antaŭ la separo.

Koncerne min, kiu iom enuas de rakontoj pri migrantaj animoj, al mi ŝajnas vere bonaj la finaj vortoj de la filozofo, kiam, trinkinte la venenon, li diris al Kritono sian lastan deziron: “Al Asklepio mi ŝuldas unu kokon, ne forgesu pagi tiun ŝuldon” (*Fedono*, pĝ. 115).

Pri la filozofio de Sokrato oni emas pensi, ke ĝuste li inventis la metodon de *dialektiko*, tiun de demandoj kaj respondoj per kiuj oni ekzamenas la situon. Efektive, tiun metodon enigis Zenono kaj praktikis ankaŭ la sofistoj. Oni diras samtrafe, ke Sokrato direktis la filozofion al studo de la homo. En la vero la ideo apartenas al Protagoro. Esence la filozofio de Sokrato estas eklektika, sed oni povas prave diri, ke li bremsis la relativismon de la sofistoj kaj raciigis la mistikismon pitagoran. “La vero estas unu”, — diris Sokrato tre ĝustatempe, kiam jam tro multaj ĉirkaŭe rikanis pri iu ajn vero. Tiel li starigis limon interalie ankaŭ al sia “dialektiko”, kiu ĉiam riskis gliti al fraza ludo,

*Amuzo jen dispersa,  
perturba kaj perversa.*

Kaj lia traktado de la *virto* kaj *devo* preparis la premisojn al la subluma etiko de estontaj jarcentoj.

Efektive Sokrato ne bezonis konsumi siajn finajn horojn por propagandi al la fidelaj adeptoj la abocan de metempsikozo. Li ja estis bona instruisto fekunde laborinta kaj havis dignajn sekvantojn. Ĉi-foje (*Fedono*) per lia buŝo diskursas lia fama disĉiplo, kiu ne forkuris la tenton efekte reklami karan doktrinon. Sed lia plej lasta parolo estas sendube aŭtenta, kaj ĝi konfirmas altajn kvalitojn de lia filozofio, postvivinta lin prospere preter ajna metempsikozo. Do tiel aŭ alie (kaj interalie per sia specifa *akto de fido*) Sokrato atingis la senmortecon.

Facilas kredi, ke Spiros Sarafian konservis por ni la stilon de la originalo. En sia riĉa komentario li ankaŭ sciopovis alporti da helena suno kaj ĉiela bluo, tiel ke la tri grizaj libretoj ŝajnas disradii iom da varmo kaj koloro. Oni vidu mem.

**Alen Kris**



## Por flue ekposedi Esperanton

**Melichárková, Jana. Esperanto por infanoj 2 = Esperanto pro děti 2. — Dobřichovice: KAVA-PECH, 2006. — 104 pĝ., il.**

La lernolibro de Jana Melichárková *Esperanto por infanoj 2* estas daŭrigo de ŝia porinfana (mezlerneja) kurso.

Ĝi konsistas el 21 lecionoj, ĉiu dediĉita al aparta temo (semajno, ĉiu el la sezonoj, ekskurso, sportejo ks.). En la dua parto de la kurso estas instruataj sufiksoj *-id-*, *-et-*, *-eg-*, helpvortoj *pli*, *plej*, refleksivo. Ĉiu leciono konsistas el novaj vortoj kun tradukoj, ekzemplaj frazoj, demandoj kaj taskoj. Librofine troviĝas metodikaj konsiloj por ĉiu leciono (Esperante kaj ĉeĥe). Krom tio la libro enhavas suplemente tri tradukitajn popolkantojn (sen muziknotoj — tamen probable tiuj superfluas) kaj 17 kurtajn fabelojn — plejparte bone konatajn al diversaj popoloj. Gravaj vortoj el la fabeloj estas tradukitaj piednote.

La libro estas riĉe ilustrita en simpla porinfana stilo (Miroslava Tomečková). Ĉion kompletigas dudirekta vortareto (komuna por du partoj de la kurso).

Mi ne dubas, ke tiu ĉi lernilo allogos infanojn kaj ebligos al ili (helpe de bona instruisto) flue ekposedi Esperanton.

**Valentin Melnikov**

## Nova vendorekordo de UEA

Laŭ *Gazetara Komunikado de UEA* vendoj de la Libroservo de UEA pasint-jare denove kreskis kaj sumiĝis je 133 919 eŭroj, kio estas je 4,6% pli ol en 2005. La Libroservo vendis entute 2459 diversajn titolojn. La liston de la totalaj vendoj konsistigas plejparte vendoj al aliaj libroservoj, kiuj mendas eldonaĵojn de UEA. En ĝi la unuajn lokojn okupas, nature, libroj de UEA/TEJO.

La dua listo enhavas unuekzemplerajn vendojn al individuaj klientoj, kaj en ĝi plej supre estas ne libro de UEA, sed PMEG eldonita en Usono, kies 57 ekz-oj estis venditaj dum la jaro en Roterdamo.

Temas nur pri la libroservo de UEA, ne pri la tuto. Sed la disko *Esperanto elektronike* pasint-jare furoris en la Esperanto-merkato kun 9 mil venditaj ekz-oj, el kiuj la libroservo de UEA vendis nur 86 ekz-ojn (ĉ. 1%).

### Vendoj entute (pli ol 100 ekzempleroj)

- 347 ekz. *Vojaĝo en Esperanto-lando* (Kolker)\*
- 322 ekz. *Pasporta Servo*\*
- 272 ekz. *Lingvo kaj popolo* (Tonkin)\*
- 186 ekz. *Saluton!* (Childs-Mee)\*
- 161 ekz. *Sed homoj kun homoj* (Sikosek)\*
- 143 ekz. *Internacia Kongresa Universitato 2006\**
- 131 ekz. *Gerda malaperis!* (Piron)
- 123 ekz. *Etimologia vortaro de la propraj nomoj* (Cherpillod)\*
- 118 ekz. *Lumo, mallumo kaj kelkaj memoroj* (Boulton)\*
- 108 ekz. *Plena manlibro de Esperanta gramatiko* (Wennergren)
- 107 ekz. *Manlibro pri instruado de Esperanto* (red. Kováts)
- 102 ekz. *Pocket Esperanto Dictionary* (McLinen)\*

### Vendoj unuopaj

- 57 ekz. *Plena manlibro de Esperanta gramatiko* (Wennergren)
- 44 ekz. *Pasporta Servo*\*
- 36 ekz. *Etimologia vortaro de la propraj nomoj* (Cherpillod)\*
- 32 ekz. *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (ĉefred. Waringhien)
- 32 ekz. *Vojaĝo en Esperanto-lando* (Kolker)\*
- 31 ekz. *Lingvo kaj popolo* (Tonkin)\*
- 28 ekz. *Manlibro pri instruado de Esperanto* (red. Kováts)
- 27 ekz. *Samideanoj* (red. Korĵenkov)
- 24 ekz. *Vizito al la Centra Oficejo* (Balaž / Veuthey)
- 23 ekz. *Nederlands-Esperanto-Nederlands woordenboek* (De Smedt)
- 23 ekz. *Historio de Esperanto* (Korĵenkov)
- 22 ekz. *Extraordinaire diversité des langues* (Cherpillod)

\* Eldonaĵoj de UEA/TEJO

## Dezertaj klifoj

Jünger, Ernst. *Sur la marmorklifoj* / Trad. el la germ. Bertil Nilsson; postpar. Tomasz Chmielik. — La **Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro**, 2006. — 127 pĝ.

Kiam Germanio estis perdinta la duan mondmiliton, la lando estis tute en ruinoj. Kompleta rekonstruo de la lando estis necesa, ne nur de domoj kaj infrastrukturoj, sed ankaŭ de la spirita vivo, la kulturo. La intelektuloj evidente perfidis la valorojn de eŭropa humanismo kaj kunlaboris senprobleme kun la nazia reĝimo. Aliaj, kaj ĝenerale la plej konataj, kreivaj homoj devis fuĝi por eviti nazian persekuton aŭ forlasis la landon en abomeno.

Tiel la dezertigo de la germana kulturo komenciĝis jam en 1933, ĉar ĝenerale restis nur sengravaj aktistoj de la kulturo (tamen estis kelkaj esceptoj!). La ekzilitoj agis en eksterlando kiel konservantoj de la humanista tradicio.

En Germanio restis nur tiuj, kiuj kapablis aranĝi sin kun la reĝimo aŭ tiuj, kiuj mistaksis la potencialon de la nazia teroro. Ili povis iel verki, dum la ministro pri propagando atente gvatis ilian verkadon por malhelpi eventualan kritikon. Tiuj verkistoj ne necese estis nazioj, sed ja kapablis verki en la kadro de la reĝimo. La verkistoj estis, kiel ili diris poste dum akra debato kun Thomas Mann, en “interna ekzilo” (“innere Emigration”). Kelkaj eĉ defendis sian reston en Germanio. Tiuj argumentis, ke nur ili havis rajton partopreni en la postmilita rekonstruo, ĉar nur ili spertis la germanan honton ĝisfunde. Tiuj debatoj feliĉe ne estas nia nuna temo, sed estas grave kompreni la historian fonon de *Sur la marmorklifoj*.

Ankaŭ Ernst Jünger spertis la situacion de la tiel nomata interna ekzilo: “Ni vivis en epoko, dum kiu verkisto



estas kondamnita al soleco” (pĝ. 58).

Jünger estis ekstrema naciisto, ĉiam trovebla sur la plej dekstra politika flanko. Li ne tute malkonsentis kun la celoj (sed tute ne kun la metodoj) de la nazioj, ĉar ĝenerale tiu movado estis tro pleba por lia gusto. “Ĉiaspeca feĉo sub la gvido de homoj el la arbaroj tiam kutimis nokte aperi antaŭ la bienoj, kaj kiam oni rifuzis al ili eniron, ili rompis la serurojn per forto” (pĝ. 34).

Ĉu tio ne frape similas al la konduto de Hitleraj sturmtrupoj? Jünger ĉiam insistis, ke legi lian romanon *Sur la marmorklifoj* estis absurda entreprenno. Fakte ne gravas multe, ĉu ni legu tiun romanon kiel konkretan reagon al kontraŭkulturaj fortoj aŭ ĉu ni transcendu ĝin al ĝenerala disputo pri nihilismo kaj anarkiismo.

### Vivi sur marmorklifoj

Kio estis antaŭ la nihilista invado de la arbaranoj? En la komenco la rakontisto kaj ties frato Otho vivas serene en iu feŭda socio en Marina, kaj tie ili dediĉas siajn vivojn al serena

kontemplado kaj intensa studado de botaniko. Por percepti kio okazas en la mondo, ili devas grimpi la klifojn, kaj tiam: “Ni vidis de tiu alteco la vivon, kiu sur malnova grundo bone zorgita disvolviĝis kaj portis fruktojn, kiel la rebo. Ni vidis ankaŭ ĝiajn limojn: la montojn, kie la plej alta libero, kvankam ne akompanata de abundo, loĝis ĉe la barbaraj gentoj, kaj en norda direkto tiujn marĉajn kaj malhelajn grundojn, el kiuj sanga tiraneco minacis” (pĝ. 31).

Tiu minaco fontas en la potencavida arbarmastro kaj ties helpanto Braquemart, kiuj ĉasas ĉiujn kontraŭulojn kaj ĵetas ilin en karceron. “Super tiaj keloj sin levas la fieraj palacoj de tiraneco kaj la bonodoroj de la festenoj: stinkaj kavoj de plej teruraj specoj, kie naŭza feĉo timige sin amuzas malhonorigante homdignon kaj homliberon. Tiam la muzoj silentas, kaj la vero komencas flagri kiel kandelflamo en vento” (pĝ. 68). Finfine la fratoj devas forlasi sian ekzistadon de estetika kontemplado kaj fronti la tiranecon. Ili malvenkas kaj devas fuĝi. Rezigne la rakontanto konstatas: “Tamen estis nia destino malproksimiĝi de ĉiu loko, kiu donis al ni ŝirmon sur la tero. Ni nun lasis niajn posedaĵojn kaj rapidis tra la ĝardena pordo al la haveno. [...] Ni vidis nian domon situanta en la ombro de la marmorklifoj kun ĝiaj blankaj muroj kaj larĝa ardeztegmento sub la pala rebrilo de fora fajro” (pĝ. 103–104).

Mi devintus skribi tiun recenzon antaŭ kelkaj monatoj. Plurfoje mi sci-voleme kaj avide eklegis, sed mi ĉiam devis halti post kelkaj paĝoj pro la afekte pompa lingvaĵo de Jünger. Mi demandis min, ĉu mi vere volis legi kiel “la oraj fadenoj de l’ vivo susuras sur la ŝpinrado” (pĝ. 9) kaj similaj kiĉaj pastoraloj. Finfine mi tamen atakis la libron dum iu kuraĝa mateno ... kaj tamen trovis ioman ĝuadon en pli vizia lingvo fine de la libro.

Feliĉe, la traduko de Bertil Nilsson mildigas la plej vulgarajn misstilaĵojn de Jünger. Mi ne povas kompreni, kial oni povas frandi la stilon de Jünger. Bone, tio estas demando de gusto, sed oni povas konstati, ke nuntempe ne estas multe da homoj kiuj, kiel Tomasz Chmielik, taksas Jünger tiel alta kiel Thomas Mann. *Sur la marmorklifoj* ĉiam havos valoron kiel dokumento de humanismo en la plej tenebra epoko de la germana historio.

Wolfgang Kirschstein

## Internacia literatura konkurso EKRA-2007

Esperantista domo de kulturo D-ro Ivan Kirĉev, Razgrad (Bulgario), anoncas internacian literaturan konkurson pri poezio kaj humuraĵoj, originale verkitaj en esperanto EKRA-2007, je libera temo. La verkoj ne devas esti ĝis nun publikigitaj en periodaĵoj, partoprenintaj en aliaj konkursoj aŭ aŭtorete.

Verkojn por la konkurso, subskribitajn per pseŭdonimo, oni sendu en tri ekzempleroj al la organizanto (Esperantista domo de kulturo D-ro Ivan Kirĉev, str. Sv. Kliment 36 ap. 1, BG-7200 Razgrad, Bulgario). La nomo kaj la adreso de la aŭtoro estu en aparta fermita koverto surskribita per la sama pseŭdonimo.

La jurio kunsidos 7 jun 2007. La premioj estos esperantaj libroj kaj diplomoj. Premiitaj verkoj aperos en *Literatura Foiro* kaj en *Esperantista Tribuno*. La anonco de la rezultoj kaj la premiado okazos kadre de la esperanta kultura festo *Abritus-2007* en Razgrad, 9–10 jun 2007.



## Lingvo kaj popolo

**Tonkin, Humphrey. *Lingvo kaj popolo: Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado*. — Rotterdam: UEA, 2006. — 159 pĝ.**

Kiam oni parolas pri Esperanto al eksteruloj, ni ofte kaŝas kio ni estas: ni prezentas ofte ion pli ol ni estas, kaj aliflanke ion malpli. Ni iom pufigas la nombron de parolantoj kaj de rekonoj, la kvalitojn de niaj ĉefoj ekster la Esperanto-medio, ni iom indulgas al kelkaj mitoj ripetigantaj de generacio al generacio, ne surprizante la penon historie kaj objektivite kontroli ilin. Aliflanke ni preferas silenti pri kelkaj el niaj malsukcesoj, pri la fakto ke multaj niaj institucioj apenaŭ plenumas onon de siaj celoj, ke multaj aktivadoj estas nur surpaperaj, ke multaj klopodoj estis malsukcesaj ĉar mankis al ni ideoj, strategio, taktiko: ni ja estas amatoroj-volontuloj. Nia “movado” estas plejofte senmova, kaj eĉ la vorto “movado” estis ekzilita el la subtitolo de *Heroldo*, kie ĝi pompis dum pluraj jardekoj. Kio do estas ni esperantistoj? Ni estas popolo kunigita per nur unu elemento, fortika ligilo pro sia graveco, sed aliaspekte malfortika pro sia ununureco: la lingvo.

Trovi tiun feblan trajton kunigantan lingvon kaj popolon, kiu tamen rezistas de 120 jaroj ne ĉiam estas facile: decenraj fortoj nin disigas, alcentraj fortoj nin rekunigas. Humphrey Tonkin estas bona observanto dum jam pli ol duona jarcento: li travivis kiel atestanto la malfermiĝon de TEJO al la orienteŭropa vento (dum la 17a IJK, de li kunorganizita en 1961, estis subskribita la “Interkonsento de Wokingham”); li protagonistas en la konfliktoplena amo inter TEJO kaj UEA; filo kaj patrino ofte kverelas, disiĝas, sin insultas reciproke (“Ŭa, ŭa, UEA!”), sed restas intime ligitaj. Kaj post la necesa generacia ŝanĝo ŝuldita al la Sesdekoka, sed alveninta al nia mondo kun plurjara histerezo, Tonkin alprenis la postenon de plej alta ĉefo de tiu popolo; kaj, ni diru sincere, el la postaj prezidantoj de UEA, sendube siavice meritplenaj, neniuj taŭgis kiom li. La rilatoj de Tonkin kun Ivo Lapenna estis tiu de filo al patro, patro kontestata, sed spurata kaj superata: Tonkin estas universitata profesoro, eĉ rektoro, akademiano, denaska parolanto de la lingvo plej firmiĝinta en la mondo, literaturisto, oratoro, docento, preleganto, vojaĝanto, organizanto: li do estas escepte bona gvidanto por nin konduki lernocele tra la meandroj de nia esperantista vivo. Recenzo



Humphrey Tonkin

entute ne necesus: por vino bona, ŝildo ne bezona.

Lia verko *Lingvo kaj popolo*, kun subtitolo “Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado”, originas kiel prelegaro por la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano. La prelegoj ne estis persone prezentitaj pro lastmomenta malhelpo, sed estis aŭdigataj per disko, kun eblo por la studentoj altelefoni la malĉeestan preleganton. Tiu origino estas unuflanke ĝia atuto: didaktike klaraj subdividoj de la temo, esencaj elementoj sen fatraso, science dokumentitaj asertoj, rapidaj aludoj por publiko atenta, jam lingve sperta kaj movade duonsperta. Aliflanke tiu origino estas ankaŭ malatuto: se la persona pronomo “mi” taŭge impetas elokvente fare de profesoro malantaŭ katedro kaj antaŭ publiko, kiu ja vidas la personon, vidas liajn gestojn kaj mienon kaj partoprenas en lia streĉo komuniki, tiu “mi” invadas la skribitajn paĝojn iom tro sturme. Tonkin raportas pri siaj streĉoj, tiel ke ofte la eventoj ŝajnas personaj, kaj sukceso aŭ malsukceso atribuita pli multe al unuopuloj ol al la popolo mem. La verko estas ege instrua por la publiko al kiu ĝi estis origine destinita; certe ĝi povus prezenti nian popolon ankaŭ al la eksteruloj, kaj tradukado al naciaj lingvoj estus ege dezirinda. Tamen en ĉi okazo necesus plurloke adaptoj: multaj mencioj estas klare (kaj prave) direktitaj nur al la interna publiko.

La verko dividiĝas laŭ ok ĉapitroj; al UEA estas dediĉita unu tuta el ili, plus pluraj aliaj paĝoj dise en la aliaj ĉapitroj. Diskutinde estas, ĉu efektive UEA estas tiel preskaŭ ekskluziva centra motoro: ekzistas amaso da aliaj organizaj(et)oj kiuj sume levas la pre-

stiĝon de Esperanto kaj tamen ne estas ligitaj al UEA kaj flegas aliajn mediojn: IKUE, la PEN-klubo, Esperanto Radikala Asocio, Oomoto eĉ ne estas menciitaj, kaj AIS San Marino aperas nur en rilatoj kun la Internacia Kongresa Universitato, malgraŭ ke tiu kongresa partopreno estas nur eta ero (kaj ne ĉiam la plej sukcesa) de la vasta agado de AIS. Kaj tamen tra tiuj strukturoj, kaj ekzistas multaj aliaj, venas al la lingvo ne sensignifa nombro da personoj. Ili ne fariĝos movadanoj, sed ili ja konsistigos parton de la popolo kaj kontribuos al la ekstera aspekto de la lingvokomunumo. Ni volonte sekvas la aŭtoron en la plena agnosko, ke UEA estas la ĉefa strukturo, la skeleto, sed la lingvon praktikas kaj evoluigas ankaŭ multaj aliaj instancoj paralele al UEA. Ekzemple, sur la kultura kampo aliaj eldonejoj estas multe pli produktivaj, kaj UEA eĉ ne celas konkurenci; se veras, ke UEA subtenas la libromerkaton per sia konstanta mendo de preskaŭ ĉiuj Esperanto-eldonaĵoj kaj alvenas per sia gazeto al certe pli ol dekmilo da legantoj (dekoble ol la aliaj plej disvastiĝintaj gazetoj), estas ankaŭ vere, ke pluraj aliaj libroservoj, unuope pli etskale, sed kune pli grandskale, ludas siavice konsiderindan rolon por krei kaj disvastigi la Esperantan kulturon.

Tonkin tuŝas la eternan demandon: kiom da esperantistoj ekzistas? Sagace, li ne respondas, sed proponas aliajn demandojn: kio estas esperantisto? Ĉu kotizpaganto, kursfininto, diplomakirinto? Ĉu utiliganto de la Pasporta Servo aŭ detempaltempa leganto de iu gazeto hazarde trovita? Ĉu aktiva movadano aŭ trareta babilulo? Ĉu tiu nerespando estas tute saĝa kaj scienca sinteno, kiu krizigas ĉiujn tiaspecajn statistikojn ankaŭ pri la aliaj lingvoj. Tamen, ne ricevante respondon al tiu baza demando, la leganto riskas senti sin iom mistifikita., ĉar eĉ ne proksimuman takson li ricevas laŭ la diversaj niveloj de lingvokono. Ja, esperantistoj ne havas ŝtaton kiu statistikas, kaj eĉ kie ŝtatoj statistikas pri lingvoj, tiuj rezultoj havas vastan gamon de nekredindeco. Sed ni bezonas kredi ion, eĉ nombrojn nekredindajn, kiam aliajn nombrojn ni ne havas.

Kvankam polemiko estas, kaj ĉiam estis, esenco en la idealismaj kaj pacemaj movadoj, laŭ mia modesta opinio en la verko oni tro evidentigas konfliktojn kompare al konkordoj, kaj laŭdojn apudas ĉiam kelkaj “sed”-oj. Ja veras, ke *Heroldo* ludas, nun same kiel ĉiam antaŭe, opozician rolon rilate al UEA,



sed entute estus preferinde evidentigi la kunfluojn ol la diverĝojn. Eble la recenzanto pekas je neobjektiveco, sed aliflanke la konfliktoj estas videblaj nur de interne: la ekstera mondo entute ne perceptas ĉu ene de la Akademio estas malsamaj opinioj (kiel en ĉiuj akademioj) aŭ ene de estraro konfrontiĝas eĉ akre diversaj strategioj (kiel en ĉiuj estraroj). La subtitolon “Aktualaj problemoj” mi estus aliiginta al “Aktualaj celoj kaj agadoj”.

Ofte Tonkin, ekzamenante nesukcesintan aŭ nur parte sukcesintan agadon, konkludas per “ni devus agi pli!”; mi estus preferinta konkludon per “ni devus ĉesi (agi tiel kaj male agi alimaniere)”. Ja, la granda ŝanĝiĝo de la komunikado ŝanĝis (kaj ŝancelis) ankaŭ niajn celojn: se antaŭe ni celis al komunikado, nun ni celas al egalrajteco je komunikado kaj sekve al faciligo de la homaj rilatoj ĝenerale. Tre skrupule kaj precize Tonkin ilustras la redifinon de nia celaro: kaj efektive la nunaj celoj, kompare kun la praaj de la tempoj de la UEA-fondo, estas pli entuziasmigaj. Tamen ĉiam rolas, iom obsede, komparo kun UEA: la celoj de la komunumo ne nepre kongruas kun tiu de (sia plej granda) asocio. Almenaŭ, ne ĉiam la ordo de graveco de celoj, se entute oni volas vidi tion en statuto, kongruas. La UEA-lorno plene kontentigas la centran vidon, sed aberacias ĉe la lensorando.

Impona kolekto de bibliografiaj referencoj estas alia atuto de la verko. Ĉiuj mencioj kaj citoj havas sian respondan fonton librofine. Granda helpo al la informanto pri Esperanto, granda helpo al memlernado de la priinforma strategio. Krome, apendice aperas tri gravaj dokumentoj: la Deklaracio de Tyresö (1969), la Manifesto de Raŭmo (1980) kaj la Manifesto de Prago (1996). Ĉi tiuj dokumentoj fiksas la ritmon de la evoluo de celoj kaj metodoj: do bone, ke ili estas kolektitaj kaj abunde komentariitaj en la libro.

Verko priskriba, do, sed ankaŭ preskriba; verko paĝonombre modesta, sed sugesta; verko impeta, kaj eble profeta. Ĝi plenrajte povus aparteni al serio “Ni lernu per la eraroj”, samkiel al serio “Obstine antaŭen, la nepoj nin benos”. Tonkin estas optimisto kaj rigardas kun espero al la estonto: malgraŭ diverĝoj kaj konfliktoj, la Esperanta popolo estas tamen pli bona ol la cetera ĉirkaŭa mondo, kaj povas plibonigi ĝin: “La nova sento restas ĉiam nova” estas la lastaj vortoj de la libro, plene prikonsentindaj.

Carlo Minnaja

## Jarronde tra la mondo

*Monatoj tra la mondo / Kompilis Hori Yasuo. — Maebaŝi: Horizonte, 2005. — 96 paĝoj.*

Ĉio genia estas simpla — tiun aksiomon sukcese pruvis Hori Yasuo, la aŭtoro de la sukcesa libroĉeno *Raportoj el Japanio*. En sia nova projekto li petis skribi: kion oni faras en ĉiu monato en diversaj mondopartoj. Respondis esperantistoj el deko da landoj de Azio, Eŭropo, Afriko kaj ambaŭ Amerikoj.

La raportoj malsamas enhave kaj amplekse. Iuj akurate sekvas plenan jarciklon, aliaj aperas nur unu-du fojojn. La stiloj ankaŭ varias de kurtaj faktoplenaj ĵurnalistaj raportoj el Francio ĝis vastaj, sonantaj kiel versoj en prozo, skizoj de ĉarma norda naturo de Finnlando, kiuj jen odoras per someraj floroj jen tremigas per frosta januara vento.

En Vjetnamio okulftrapas simbiozo de epokoj kaj ideologioj — kiel jarcentojn antaŭe hundo alternas kokon en la bestara kalendaro, incenso prifumas portreton de prezidanto Ho Chi Minh kaj la popolo entuziasme festas la tagon de liberiĝo de Suda Vjetnamio post la tago de praulara kulto.

Mirinda afero: komence de la tria jarmilo, kiam la homaro pretas trapaŝi la limon de sunsistemo kaj penetri interstelan senfinan spacon, de kiu la tero apenaŭ videblas kiel sablero inter miliono da sableroj eterne flugantaj en nigra silento de kosmo, ni, aborigenoj de ĉi tiu sablero, spite al kondamnata kaj jam delonge aŭgurata tutmondiĝo, ankoraŭ, ofte draste preskaŭ ĝis plena kontrasto malsamas per lingvoj, moroj, vivkondiĉoj, religioj. Eĉ tuthomaraj valoroj — kvintesenco de la okcidenta civilizo — valoras ne ĉie kaj ne por ĉiuj...

Sed el tiuj malsamaj kreiĝas multkolora portreto de la homaro. Des pli grave ke ili ne kaŭzu mistakson kaj malkonfidon sed servu al reciproka pliriĉiĝo de ĉiuj kulturoj. Tiusece la libro modele esprimas internaciecan spiriton de Esperanto.

La unuajn raportojn el ĉiu lando garnas skemaj mapoj, mankas nur mapo de Usono — ĉu pro antiglobalisma inklino de la kompilinto? Aliaj mapoj ankaŭ surprizas — en Eŭropo aperis nova ŝtato Mordavio (pĝ. 10), Laoso kaj Kamboĝo (pĝ. 8) ial interŝanĝis siajn nomojn, la plej granda oceano (pĝ. 7) reduktiĝis ĝis Pacifika maro. Sed eble maljuste mi suspektas la eldoniston pri nekono de geografio, kaj tiuj misaĵoj estas nur testo por atentemaj legantoj? Se tiel: mi atendas premion!

Nikolaj Penĉukov

## Dialogilo inter malamikoj

22 jan en *Asahi Shimbun* aperis ampleksa intervjuo de Renato Corsetti, la prezidanto de UEA. *Asahi Shimbun* kun eldonkvanto ok milionoj da ekzempleroj estas unu el la plej grandaj ĵurnaloj de la mondo kaj la plej prestiĝa en Japanio. La intervjuo de Corsetti aperis en la dua paĝo, en la prestiĝa rubriko “Hito” (“Persono”).

La intervjuon faris en Romo Fusako Go, longtempa estro de la oficejoj de *Asahi Shimbun* en Romo kaj Ĝenevo. Fusako Go multe demandis pri la persona vivo de Renato Corsetti kaj pri ĉiuj flankoj de Esperanto, de la historio de la lingvo al pure lingvaj demandoj: kiel la Akademio decidas pri novaj vortoj.

Corsetti rakontis, interalie, pri UEA kaj la agado “lingvo de paco”, pri la kursoj por afganaj rifuĝintoj, kaj el kio ni venis al la granda problemo de ĉi tiu epoko: la bezono pri dialogo inter la okcidento kaj la islama mondo. Laŭ la prezidanto de UEA, la destino de Esperanto estas servi kiel dialogilo inter malamikoj, sed la rolo de Esperanto en la nuna situacio ne estas same evidenta kiel dum la malvarma milito, li diris al la ĵurnalistoj:

“La problemo estas tre komplika, ĉar la okcidento sentas sin forta kaj samtempe atakata, dum la islama mondo sentas sin kaj malforta kaj daŭre atakata. Evidente Esperanto ne povas multe utili en tiu situacio, kvankam ĝi utilis en similaj situacioj dum la malvarma milito por iel kontaktigi homojn el ambaŭ partoj de la fera kurteno. Ni analizis la islamajn landojn, kie la Esperanto-movado estas iom dinamisma, kiel Irano aŭ Pakistano, kaj mi esprimis la deziron ke Esperanto povu roli ankaŭ por ĉi tiu nuna dialog-bezono kiel ĝi rolis en la pasinteco”.

ĈRI



# Esperanto en muziko: ne nur en Esperantujo

En februaro ni prezentis kelkajn bandojn kiuj utiligas Esperanton kiel la nomon de sia bando aŭ albumo... Ni daŭrigas tiun prezenton per plia materialo, plukita dank' al la diversaj spionoj en la reto — apartajn dankojn al Andrea, Henriko kaj Tonjo!

Nun ni parolu pri tri bandoj: *Esperanto*, *Le Punk* kaj *Rêverie*.

## HISTORIO DE ESPERANTO

Fine de 1971 belga violonisto Raymond Vincent, post pluraj malsukcesaj bandoj, decidis lanĉi pli aŭdacan muzikan aventuron. Li renkontis bruselan pianiston Bruno Libert. La du muzikistoj kune kun italaj-belgaj fratoj Malisan (basisto Gino kaj drumisto Tony), komponis serion da titoloj kaj surbendigis la unuan demon en studio.

La kvaropo kun la demo iris al Britio, kaj tie ili konatiĝis kun David Mackay, kiu trovis pliajn muzikistojn por la nova bando: aŭstralian kantiston Glenn Shorrock kaj la in-korusan triopon de Cliff Richard (Joy Yates, Janice Slater kaj Bridget Dudoit).

La bando bezonis gitariston, kaj David trovis plian aŭstralianon Brian Holloway. Korda ensemblo por subteni la violoniston kun Godfrey Salmon (dua violono), Tony Harris (alto) kaj Timothy Kraemer kompletigis la novnaskitan bandon.

Kvankam ili kantis en la angla, ili nomis la bandon *Esperanto* pro la internacieco de la muzikistoj, kiuj konsistigis la grupon.

En luita farmo en Kornvalo dum kelkaj semajnoj la 12-persona grupo komencis muzikekzercadon. La kontakto estis bonega kaj kreiva. Poste *Esperanto* daŭrigis la laboron en alia farmo en Belgio kaj surbendigis en Londono la unuan albumon, kiun eldonis A&M. La unua disko *Rock-Orchestra* aperis en 1973. Samjare aperis dutitola vinila disketo. A&M eldonis la albumon kaj la disketon internacie: en

Britio, Usono, Aŭstralio, Brazilo, Germanio, Japanio, Venezuelo kaj Nederlando.

*Esperanto* helpe de manaĝistoj organizas turneon en Britio kiel unua parto de la fama bando *Sha na na*. Poste *Esperanto* turneis en Eŭropo kun la bando *Strawbs*, kaj dank' al tio faris serion de registraĵoj dum vivaj koncertoj en Romo, Napolo kaj Torino, kiun disaŭdigis la itala televido.

Post la turneoj la dekduopo izoliĝis en kimra kastelo por prepari la duan albumon... Sed post la registrado A&M rifuzis aperigi la diskon. Tio kreis tensiojn inter la muzikistoj — Glenn Shorrock forlasis *Esperanton* kaj revenis al Aŭstralio.

A&M petis al Peter Sinfield, kiu laboris kun *King Crimson* kaj ELP, arte produkti la novan albumon. Peter konsentis, kaj venigis novan kantiston, Keith Christmas. La samaj muzikaĵoj estis rearanĝitaj kun la voĉo de la nova kantisto.

La dua disko *Danse Macabre* aperis en 1974. Se en la unua albumo oni sentis, ke la bando serĉas sian stilon kun influoj popaj, rokaj, klasikaj kaj progresivaj, la dua albumo estas pli homogena, pli progresivroka kaj la etoso estas malhela, kvazaŭ la etoso en la fantome hantata kimra kastelo forte influas la muzikon. Peter Sinfield implikiĝis tiel forte en tiu albumo de *Esperanto*, ke li rifuzis produkti la unuan albumon de *Supertramp!*

A&M preparis novan turneon de *Esperanto* en Britio, ĉi-foje kun la

franca bando *Magma* tiam tute ne konata en Britio. La konsisto ŝanĝiĝis... Venis nova kantisto Roger Meakin, kies voĉtempo tre specifa bone akordiĝis kun tiu de Kim Moore. La tri korusaninoj foriris...

La surbendigado de la tria albumo okazis parte en Londono kaj parte en la famega kastelo Hérrouville en Francio, kie surbendigis *Jethro Tull*, Elton John kaj aliaj famuloj.

La tria albumo *Last Tango* estas arte produktita de Robin Geoffrey Cable (soniĝeniero kaj produktisto interalie de *Queen*, *Genesis* kaj Elton John). Ĝi aperis en 1975.

*Esperanto* trovis perfektan muzikan ekvilibron. Ĝi koncertis en famaj festivaloj en Bilzen, Newcastle, Reading, Paradiso en Amsterdamo, Montreux en Svislando.

Kvankam *Esperanto* ekfamiĝis, ĝi ne estis informita pri la rezultoj de la diskovendado de A&M en la tuta mondo kaj longe ricevis neniun tantiemon. Malgraŭ tio A&M ne renovigis la kontrakton. La muzikistoj estis konsternitaj, kaj ĉe la komenco de la kariero la projektoj de la bando sinkis...

*Esperanto* fariĝis viktimo de la diskokrizo, okazinta en 1973–74 en Britio, kaj ĉar ĝi estis multnombra kaj bezonis grandajn rimedojn teknikajn kaj financajn kaj por la surbendigoj kaj por la koncertoj.

La reguloj de la tuja profito diktis tiun decidon al A&M malgraŭ la artaj kvalitoj de *Esperanto*, kiu postlasis nur tri belegajn albumojn.

Sed 15 jarojn post la malapero de *Esperanto*, A&M tra aliaj eldonejoj reeldonis la tri albumojn sur KDoj en Japanio, Ruslando kaj Koreio.

Legu pli ĉe: <http://www.esperanto-rock-orchestra.com/index-fr.html>



## LE PUNK EL MADRIDO

En Hispanio famiĝas rokbando *Le Punk*. Jen raraĵo: ĝi enmetis unu Esperanto-kanton *La lukto estas perdita* en sian plej freŝan albumon, aŭskulteblan rete ĉe: <http://www.myspace.com/lepunkmadrid>.

La kantisto lernis Esperanton kaj venis al li la ideo verki tekston en la internacia lingvo... kaj kanti ĝin. Li faris tiun laboron sola kaj sen helpo de kleruloj, kio klarigas misan prononcon... Tamen la ideo kaj rezulto estas laŭdindaj, kaj la bando meritas ke oni malkovru ĝian muzikon.

Fine de 2000 Alfa (kantisto) kaj Joe (gitaristo) el la bando *Perros de Paja* (Pajlaj hundoj) decidis starigi novan bandon kun tute alia muzika koncepto. Ili kontaktis konatajn muzikistojn — Dani “Patillas” (basisto), Tuli (saksofonisto, klarnetisto) kaj Leyva (drumisto). Kaj naskiĝis *Le Punk*.



La bando estis bone akceptita de la publiko en koncertoj, kvankam la stilo estas tute noveca kun miksado de stiloj apenaŭ kongruaj: tango, milongo, rokenrolo kaj svingo.

En 2001 Leyva foriris, kaj eniris eksterordinara drumisto Datz kiu plifortigis la bandon.

Post pluraj koncertoj la bando surbendigis kelkajn titolojn por demo, kiu poste fariĝos la starpunkto de ilia unua disko... En la sama periodo pianisto Carlos Ramos aliĝis al la bando.

Multaj koncertoj dum 2002 donis al *Le Punk* bonan sperton, kaj ĝi pliriĉigis sian repertuaron per novaj kantoj. Al la cititaj stiloj aldoniĝis balkan-folkloraj kaj ciganaj influoj, kiuj donas apartan etoson al tiu nedifinebla rok-stilo.

Finfine ili surbendigas sian unuan albumon *La logia de la canalla* (La loĝio de la kanajloj), kiu aperis en 2003 kun helpo de la produktejo *Tam Tam*.

Tuj post la apero de la disko Datz forlasis la bandon, kaj *Le Punk* restis sen drumisto en la momento kiam la disko estis lanĉota per turneo... Ili sukcesis trovi la drumiston Nacho Labra-



dor Igartúa ĵus antaŭ la starto de la turneo. La turneo kun 20 koncertoj daŭris ĝis somero 2004.

Inter la koncertoj, en la konkurso *Wanadoo Discoveries*, konkurante kun dek aliaj hispanaj bandoj, *Le Punk* gajnis la unuan premion kaj rekompence vojaĝis al Montpeliero (Francio) por prezentiĝi dum granda spektaklo antaŭ 6000 personoj kun granda sukceso!

Post tiu mirinda aventuro la bando reenstudiĝis kaj registris novan kvin-titolan albumeton. Ĉi tiu registrado estis la lasta kun la pianisto Carlos Ramos kiu, lasinte sian lokon al César G. Miranda, dediĉis sin al solkariero.

Dum 2005 ili preparis novan albumon, kaj koncertis en 28 urboj hispanaj. *Le Punk* pli kaj pli famiĝis kaj estis elektita de *Instituto Cervantes* por iri al Varsovio.

Fine de 2005 *Le Punk* subskribis kontrakton kun la diskeldonejo multinacia *Virgin*, kaj finfine en septembro 2006 aperis la dua plena albumo *No disparen al pianista* (Ne pafu la pianiston), kun la menciita kanto *La lukto estas perdita*.

Pliaj informoj ĉe: [http://www.lepunk.es/pantalla\\_normal.htm](http://www.lepunk.es/pantalla_normal.htm) kaj <http://www.le-punk.com/>

Forumo: <http://www.le-punk.com/foro/viewtopic.php?t=2433>

## ITALA RÊVERIE

Andrea Fontana (Anĉjo PacHorano), loĝanta proksime de Milano eklernis Esperanton en novembro 2004 kaj en 2006 li eniris la espo-movadon.

Komence de 2006 lia amiko Alberto Sozzi, muzikisto de la milana muzikgrupo *Rêverie*, proponis al li kunlaboron, ĉar la grupo realigas muzikon, kiu kunfandas elementojn el pluraj kulturoj kaj tradicioj, kaj do estus tre interese uzi por la tekstoj de la kanzonoj *ankaŭ* Esperanton, krom aliaj lingvoj (la itala, la antikva angla de Ŝekspiro, la friula lingvo de la itala poeto kaj filmreĝisoro Pasolini).

Andrea kaj la komponisto de la grupo, Valerio Vado, tre facile sukcesis

kunlabori, rapide verkinte sian unuan Esperanto-kanzonon *Kiam alvenos la fino*. La eksperimento tiel sukcesis, ke estis decidite daŭrigi la kunlaboron. Poste Valerio kaj Andrea verkis du pliajn kanzonojn en Esperanto: *Plurestantaj memoroj* kaj *Danco de l' maro*.

La celo de ĉi tiu projekto estas:

— por Andrea: disvastigi Esperanton en la neEsperanta nord-itala muzik-medio, konkrete montrante al neesperantistoj la artajn ecojn de la lingvo;

— por Valerio kaj *Rêverie*: disvastigi sian muzikon en la tutmonda medio de la internacia esperantistaro.

*Rêverie* estis fondita en 1996 de la milana komponisto kaj gitaristo Valerio Vado. La projekto celas realigi modernan muzikon, ĉerpante inspiron el la radikoj de la muzik-tradicioj itala (renesanca kaj baroka), eŭropa kaj mediteranea, kaj prilaborante ĉi tiujn elementojn per nuntempa sentokapablo. Kunfandiĝas do tradiciaj kaj elektronikaj sonorecoj, atingante specifan “saponon” de la sono kaj de la muziko, kiun oni difinas “progresivfolka”.

*Rêverie* ĝis nun publikigis tri KDojn kaj akiris pozitivajn recenzojn en Italio kaj eksterlande. Pluraj kanzonoj estas dissendataj de diversaj radiostacioj italaj kaj eksterlandaj.

La grupo estas nun registranta la espo-kanzonojn kaj kanzonojn eltiritajn el sonetoj de Shakespeare.



Nun la bando konsistas el: Fanny Fortunati (ĉefkantado, perkutiloj), Fulvia Borini (transversa fluto, mandolino), Alberto Sozzi (blovinstrumentoj, klavaroj, baĝo, gitaroj, perkutiloj), Valerio Vado (gitaroj, klavaroj, mandolino, voĉo), Daniele Defranchis (gitaroj), Mariella Mancuso (violonĉelo).

Legu pli: [www.reverieweb.com](http://www.reverieweb.com)

Kompilis por vi

**Flo!**

# *Kiamaniere mi venkis en beleckonkurso aŭ, kiujn sukcesojn ofertas la malsukcesaj planlingvoj*

de Katarzyna Tempczyk

**L**a afero estas ege tikla, tial do permesu al mi, karaj legantoj, kaŝi mian nomon je tiu bela pseŭdonomo. Ja la historio, kiun mi volas konfesi al vi estas vere hontinda. Ekzistas multaj kialoj por kiuj oni povas lerni Idon, tamen mi elektis la plej nepardoneblan inter ili. Mi lernis la beaufrontan lingvaĉon nek pro miskompreno, nek pro perfido, nek pro stulteco. Mi lernis Idon por mono.

Kvankam nun ne plu mia aĝo ebligas al mi membrecon en TEJO, en la tempo pri kiu mi rakontos mi estis ankoraŭ sufiĉe juna por havi nesufiĉan kvanton da mono kaj nekutimajn ideojn por plibonigi la situacion. Por senkulpigi min almenaŭ iomete en viaj okuloj mi aldonu ke tiam mi estis ankaŭ sufiĉe freŝa esperantisto kaj ankoraŭ ne konis la multnombrajn noblajn geesperantistojn kiuj poste tute klare informis min, ke malgraŭ la malgrandaj supraĵaj diferencoj, inter Esperanto kaj Ido lokiĝas tamen la granda morala abismo, kiun mi koncize esprimis en jena modesta poemo:

*Esperanto —  
mondsavanto.  
Ido —  
perfido.*

Ho, se mi sciis tion pli frue... Sed tiam mi naive kredis, ke planlingvoj diferencas nur je vortaro, gramatiko kaj kvanto de uzantoj. Kvanto de uzantoj... Jes, ĝuste tie kuŝas la kerno de mia historio. Sed ni revenu al la komenco.



Do iam — en jam delonge forgesitaj de mi cirkonstancoj — mi trovis jenan anoncon:

*La internaciona movado por l'auxiliara linguo Ido, la maxim facila linguo de la mondo, promisas premii ye konkurso por la maxim bona artikli en Ido...*

*Partoprenar povas omna persono sub 30...*

*La premii obtenebla esas:*

- 1. US\$ 800*
  - 2. US\$ 600*
- + 6 US\$ 100*

*Nelimitizita quanto di plusa premii...*

Kiel mi jam skribis, mi estis ankoraŭ freŝa esperantisto, tial, anstataŭ peti la Dion Ĉiopovan liberigi min de la tento satana, mi komencis esplori la aferon. Kiel da idistoj vivas en la mondo? Je la retpaĝoj de Ido-movado mi trovis informon pri 500. Kvankam mi estis ankoraŭ freŝa esperantisto, ja mi havis jam etan movaduman sperton, sufiĉan por dividi la nombron je pli malpli 5, ricevante la proksimuman nombron je 100 idistoj en la tuta nombro. Sed kiom da inter ili estas malpli ol 30-jaraj? Kvankam mi estis ankoraŭ freŝa esperantisto, ja mi havis jam etan movaduman sperton, sufiĉan por certe diri, ke certe la nombro ne sufiĉos por la promesitaj 8 premioj.

Pardonu al mi, ho, Dio Ĉiopova! Pardonu al mi, ho, samideanoj! Mi lernis Idon por 100 usonaj dolaroj!

Homo, kiu unufoje subiĝos influojn de malbona tento, baldaŭ dronos en malbono... Kontraŭ la venkita mono mi aĉetis lernolibron de Volapuko.

Ĉar intertempe mi jam iĝis sufiĉe konata en la zamenhofa movado, mia volapukista agado estis iom honta afero. Estis evidente, ke mi bezonis elekti por ĝi pseŭdonomon.

Ĉiu scias bone: kie aperas peko, baldaŭ aliĝas ankaŭ alkoholo... Post iom

**Dediĉe al Thomas Alexander**

da glasetoj mian kapon vizitis genia ideo: Kial mi ne estu virino? Anstataŭ kalviĝanta barbulo — linda kaj dolĉa fraŭlino?

Pardonu al mi, ho, Dio Ĉiopova! Pardonu al mi, ho, Volapukaf lens! Por mia volapukista agado mi prenis virinan kaŝnomon. Jen la peko de junio... Ĉu mi povis antaŭvidi la konsekvencojn?

Ne necesas diri, ke mia apero en Volapukujo renkontis grandan entuziasmon. *Sirkŭlapenäd* raportis kun triumfo pri la unua abonantino en ĝia dozenjara historio. La fervoro eĉ kreskis, kiam mi publike deklaris min fraŭlino. Estis evidente, ke antaŭ la movado aperis novaj ŝancoj. Eble eĉ por denaskaj volapukistoj?

Alea jacta est... Ĉu nun mi povis malkaŝi mian sekreton?

La historio okazis antaŭ multaj jaroj. Kabeinte el ĉiuj planlingvetaj movadoj, subite mi ricevis jenan leteron:

*Ho Jiflen Löfik!*

*Kun plezuro mi informas vin, ke la tutmonda komisiono unuvoĉe aljuĝis al vi la titolon de la plej bela volapukistino de la XX jarcento.*

Pardonu al mi, ho, Dio Ĉiopova! Pardonu al mi, ho, belulinoj de la tuta mondo! Por venki en la beleckonkurso ne necesas multe, foje sufiĉas nur lerni la ĝustan lingvon.

**Ĵakatyna Ĉymptek**

Pro ĉi tiu rakonto Katarzyna Tempczyk iĝis laŭreato de Liro-2006 en la branĉo Originala prozo.



## Konkurso “Muzo” reviviĝas!

En Litovio dum multaj jaroj estis tre populara kultura renkontiĝo *Muzo* kun konkursado en esperantista arta kreado. *Muzo* okazis 29-foje, laste en 1997. Estis eldonitaj kelkaj broŝuroj kun konkursaĵoj de *Muzo*. Premiitaj konkursaĵoj estis presataj en *Litova Stelo*. Post dekjara paŭzo *Muzo* reviviĝas, tamen ne aparte, sed kiel belartaj konkursoj kadre de la 43aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en Šiauliai.

La konkurso okazos en jenaj branĉoj:

**Prozo** originala (noveloj)

**Poezio** originala

**Kantoteksto** originala por ajna melodio (aldonu muziknotojn, aŭ sonbendon)

**Melodio** originala por ajna originala Esperanto-versaĵo (aldonu muziknotojn aŭ sonbendon)

**Deklamado:** recitado de poeziaĵo laŭ propra elekto

**Arta legado** de prozaĵo: laŭ propra elekto (ne pli ol 10 min.)

**Rakontado** pri iu okazintaĵo — legita aŭ elpensita

**Kantado** sola aŭ grupa (po unu kanto)

**Fotoj** pri ajna temo (ne pli ol po tri, papera kaj elektronika variantoj)

**Pentraĵoj** propagandaj (ekzemple, pri Esperanto-kurso)

Anoncitaj kaj honoritaj estos gajnintoj de unuaj tri lokoj en apartaj branĉoj.

Konkursaĵoj en la branĉoj 1-4 devas esti anonimaj (la nomo kaj adreso de la aŭtoro devas esti skribitaj sur aparta slipo, metita en pli malgrandan koverton kun surskribo de titolo de la konkursaĵo).

La konkursaĵoj devas esti senditaj ĝis 1 jun 2007 al Jūratė Bartaškiene

✉ Kalvarijų biblioteka, Kalvarijų str. 29, Vilnius, LT-09313 Litovio.

Escept-okaze, interkonsentite kun la konkursa komisiono, konkursaĵoj povos esti akceptitaj ankaŭ la unuan tagon de BET-43.

### Ricevitaj libroj

Jünger, Ernst. *Sur la marmorlifoj*: [Romano] / Trad. el la germ. Bertil Nilsson; Postpar. Tomasz Chmielik. — La Chaux-de-Fonds: LF-koop, 2006. — 127 pĝ. — [Recenzoekzemplero].

Marček, Stano. *Esperanto per rekta metodo*: Internacia ilustrita lernolibro / Il. Linda Marčeková. — Martin: S.Marček, 2006. — 110 pĝ., il. — [Recenzoekzemplero].

Marček, Stano. *Esperanto priamou metódou* / Il. Linda Marčeková. — Martin: S.Marček, 2006. — 114 pĝ., il. — [Recenzoekzemplero].

Melichárková, Jana. *Esperanto por infanoj 2 = Esperanto pro děti 2* / Il. Miroslava Tomečková. — Dobřichovice: KAVA-PECH, 2006. — 104 pĝ., il. — [Recenzoekzemplero].

*Monatoj tra la mondo* / Komp., antaŭpar. Hori Yasuo. — Maebaši: Horizonto, 2005. — 96 pĝ., il. — [Recenzoekzemplero].

Platono. *Fedono* / Trad. el la hel., antaŭpar., koment. Spiros Sarafian. — Ateno: S.Sarafian, 2006. — 120 pĝ. — [Recenzoekzemplero].

Platono. *Kritono* / Trad. el la hel., antaŭpar., koment. Spiros Sarafian. — Ateno: S.Sarafian, 2006. — 51 pĝ. — [Recenzoekzemplero].

Platono. *La apologio de Sokrato* / Trad. el la hel., antaŭpar., koment. Spiros Sarafian. — Ateno: S.Sarafian, 2006. — 85 pĝ. — [Recenzoekzemplero].

Tonkin, Humphrey. *Lingvo kaj popolo*: Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado. — Rotterdam: UEA, 2006. — 159 pĝ. — [Recenzoekzemplero].

Гончарова, Ирина. *Язык эсперанто за один месяц*: Самоучитель разговорного языка. — М.: АСТ; Восток-Запад, 2006. — 156 с.; 2000 экз. — [Aĉeto].

Гудсков, Николай. *500 самых важных слов языка эсперанто*. — М.: АСТ; Восток-Запад, 2006. — 31 с.; 2000 экз. — [Aĉeto].

### Ricevitaj gazetoj

Afrikume. 2007/4; Esperanto en Azio. 2007/55; Esperanto. 2007/2; Ĝenerala Informilo. 2007/141; Heroldo de Esperanto. 2006/17, 2007/1; Informilo por Interlingvistoj. 2006/3-4, 2007/1; Informilo. 2007/1; Juna Amiko. 2006/3; KAE-Informilo. 2007/57; Kataluna Esperantisto. 2006/340; Komencanto. 2006/6; La Gazeto. 2007/128; La Ondo de Esperanto. 2007/2; La Revuo Orienta. 2006/12; La Sago. 2007/32; Le Monde de l'Espéranto. 2007/560; Monato. 2007/2; Norvega Esperantisto. 2006/6; Okazas. 2007/560; Pola Esperantisto. 2007/1; REGo. 2007/1; Scottish Esperanto Bulletin. 2007/1; Service de Presse. 2007/32; Vekilo. 2007/1.



## Andreas Künzli

### Universalaj Lingvoj en Svislando Svisa Enciklopedio Planlingva

La verko estis lanĉita kun la celo sisteme kolekti kaj prilabori faktojn kaj datojn el la historio de la planlingvaj movadoj en Svislando, antaŭ ĉio de Esperanto kiel ĝia plej grava reprezentanto, kaj disponigi ilin al la interesata publiko en formo de enciklopedio. Ĝiaj ĉefaj intencoj estas havigi al la esperantistoj, planlingvanoj kaj interlingvistoj, sciencecan referenclibron, krei impresan pruvilon por demonstri la ekziston de la planlingva realeco en Svislando.

Eldonis *Svisa Esperanto-Societo* kaj *Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale*, La Chaux-de-Fonds (Svislando). 2006. ISBN 2-9700425-2-5.

1129 paĝoj, 6 cm dika,  
ĉ. 2000 g peza.

Internacia vendoprezco: 60 eŭroj plus sendokosto (proks. 14 eŭroj por eksterlando).

Mendu la nekutiman kaj tre interesan libron ĉe

✉ [kuenzli@osteuropa.ch](mailto:kuenzli@osteuropa.ch)  
aŭ

✉ [gacond@bluewin.ch](mailto:gacond@bluewin.ch).

Pliajn informojn vidu sub  
[www.planlingvoj.ch](http://www.planlingvoj.ch).

Ĉi tiu estas la 149a *Ondo*, kiun ni eldonis. La aprila *Ondo* estos jam la 150a. Bona preteksto por rigardi antaŭen kaj malantaŭen. Vi povas kontribui al la jubilea kajero per respondo al la demando: “Kial mi legas *La Ondon*”. Dankon!

Por la decembra tasko *La rado* venis sep respondoj. Solan problemon por la solvintoj prezentis la demando pri kartvela vira nomo, kiu ne estas PIVa, tial ni akceptis kiel ĝustajn ankaŭ variaĵojn. La ĝustajn respondojn sendis: Edmund Grimley Evans, Malcolm Jones (Britio), Jackie Huberdeaux (Francio), Ester Olsen (Norvegio), Hanna Skalska (Pollando), Oleg Vasiljev (Ruslando), Roland Larsson (Svedio).

La loto donis premion al **Hanna Skalska**, kiun ni kore gratulas!

La ĝustaj respondoj: *Centripete*: 1. afabla, 2. akcelo, 3. adoras, 4. abunda, 5. donado, 6. aferoj, 7. odoras, 8. rajton, 9. popolo, 10. kameno, 11. okazon, 12. gloron. *Cirkle*: 13. dublo, 14. dramo, 15. kalif<sup>o</sup>, 16. akcio, 17. nielo, 18. pompa, 19. ronda (ringa), 20. retro, 21. Zurab, 22. lilia, 23. droga, 24. lundo, 25. stato, 26. senso, 27. nenia.

## Trovu numeralojn

En ĉiu literaro, donita ĉi-sube, mankas iu el fundamentaj numeraloj: **unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, mil** kaj la vortoj **cento** kaj **milo**. Komence, meze aŭ fine de la literaroj almetu numeralon, kaj vi ricevos sencohavan vorton.

AIO, PANO, SEBERO, IO, TEMBRO, RO, P, KAMO, APE, LIVO, DO, PASO, KLO, ALME, BUNO, PENMILO, KOSMOTO.

Sendu la solvojn al la redakcio de *La Ondo* rete aŭ poŝte antaŭ la 15a de aprilo.

Kompilis **Tatjana Auderskaja**



### Mana lerteco

*Servistino*: Sinjorino, mi ne povas disrompi tiun grandan karbo-pecon.

*Mastrino*: Pensu nur, ke ĝi estas taso aŭ telero, kaj vi tuj sukcesos!

### Laŭdo

*Edzino*: En la atesto de nia servistino mi enskribis, ke ŝi estis malpura, maldiligenta kaj impertinenta. Sed tamen mi volus skribi ankaŭ ion bonan.

*Edzo*: Skribu do, ke ŝi havas bonegan apetiton.

### La amo

— Kion vi donacis al via fianĉino je ŝia naskiĝtago?

— Lip-ruĝigilon. Sed la duonon de ĝi mi jam rericivis de ŝi en partetoj.

### Li konas ŝin

— Mi volas aĉeti unu paron da gantoj por mia edzino.

— Je via servo, sinjoro! Sed kiun numeron, kiun koloron vi deziras? Kaj ĉu el silko aŭ el ledo?

— Tute egale! Mia edzino tamen venos por ŝanĝi ilin.

### Virinoj

*Edzo*: Kial vi parolis dum preskaŭ du horoj malsupre antaŭ la pordo kun la najbarino?

*Edzino*: Ĉar ŝi ne havis tempon por veni supren al mi.

El *La Praktiko* (jaro 1937)  
plukis **Halina Gorecka**

## SPRITAJ SPLITOJ KAJ PRESKERAROJ el la kolekto de reduktoro

### Perfekta civitano, aŭ: Vojaĝo inter la tempoj

[La] L[ingva] K[omitato] opinias ke estas kontraŭdiro inter la pozicio esprimita de c-ano William Auld en 1982 kaj la nuna. (Giorgio Silfer. Lingva Komitato pri Fundamenta interpreto // HeKo, 322 9-A, 4 feb 2007; rimarkis Kalle Kniivilä)

### Turoj por fali, aŭ: La fino de iluzioj

... tiaj akuzoj venas de homoj kaj komunikiloj el landoj... kiu[j] grandskale respondecas pri la malapero de lingvoj kaj kulturoj en la mondo nun. (Renato Corsetti. Deklaro okaze de la Tago de la Gepatra Lingvo, Gazetara Komunikado de UEA, №255, 16 feb 2007)

### Longa verdiĝo de junnaskito

La juna Valienne naskiĝis en ... 1854. ... Mallonge daŭra, apenaŭ sesjara, estis la esperantistiĝo de Valienne... (Jean Amoureux. Doktoro Valienne sen-legende // *La Gaze-to*, 2007, №128, pĝ. 10)

### Nova motoro malkoprita

Post laŭdacio [al la doktoriĝanto Ziko van Dijk], kopromotoro Marc van Oostendorp aldonis pli personan gratulon en Esperanto. (Ziko van Dijk. Doktoriĝo per Esperanto // *La Ondo de Esperanto*, 2006, №12, pĝ. 4; rimarkis Tatjana Auderskaja)

### Sufiksoj bebmuskoligaj

... pri XX 2-jara... Simple notu ŝian ĉiutagan vortuzon por postaj komparoj, ekz. la kreeman fortfaradon. (Bert Schumann en la listo denask-I, 8 jan 2007)

### Rara birdo

Represoj kaj komentarioj pri grua teoriisto, kies verkon oni longe atribuis al lia samnomo-lingvisto Jakob Grimm. (Priskribo de broŝuro pri A. Th. von Grimm, <http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=3773>)

### Sporta spirito apenaŭ plendas

Kiel membro de Palsporta Servo de pli ol 15 jaroj, mi plendas pri unu sola gasto, kaj pri 2 gastigantoj. (Françoise Noireau, <http://groups.yahoo.com/group/PasportaServo/message/1062>, 7 jan 2006)

Plukis **István Ertl**

**Tuj-konkurso!** Bonvolu tuj respondi: kiuj estas sur la foto. Se vi tuj respondis, vi rajtas surloke tuj kuiri tiom da ovoj, kiom vi volas. Se vi ne respondis, vi rajtas fari same.



## ESPERANTO-KALENDARO

25–30 apr. Triesto (Italio). *Karstaj Tagoj 2007*. ✉ CP 601, IT-34100 Trieste Centro, Italio ✉ [noredv@tele2.it](mailto:noredv@tele2.it)



4–7 maj. Letchworth (Britio). *Brita Kongreso de Esperanto 2007*. ✉ 200 Nevells Road, Letchworth Garden City, Hertfordshire, SG6 4TZ, Britio ✉ [info@britakongreso.org](mailto:info@britakongreso.org)

25–28 maj. Hamburgo (Germanio). *84a Germana Esperanto-Kongreso*. ✉ Esperanto-Kiel, Kaiserstr. 39, DE-24143 Kiel, Germanio ✉ [Esperanto-Kiel@web.de](mailto:Esperanto-Kiel@web.de)

15–17 jun. Lanark (Skotlando). *102a Skotlanda Kongreso de Esperanto*. ✉ 9 Flora Gardens, Bishopbriggs, Glasgow, G64 1DS, Britio ✉ [miacasey@ntlworld.com](mailto:miacasey@ntlworld.com)

24–30 jun. Lesjöfors (Svedio). *Someraj Kursoj*. ✉ Esperanto-Gården, SE-680 96 Lesjöfors, Svedio ✉ [egarden@esperanto.se](mailto:egarden@esperanto.se)

29 jun – 7 jul. Herzberg am Harz (Germanio). *Internacia Metodika Semajno*. ✉ DE-37412 Herzberg/Harz, la Esperanto-urbo, Grubenhagenstr. 6 ✉ [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)



14–22 jul. Šiauliai (Litovio). *43aj Baltiaj Esperanto-Tagoj*. ✉ p. k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio ✉ [litova.ea@mail.lt](mailto:litova.ea@mail.lt)

21–28 jul. Pelplin (Pollando). *18a Ekumena Esperanto-Kongreso. 60a Kongreso de IKUE. 57a Kongreso de KELL*. ✉ Jadwiga Wasiuk, Strzelnica 8, PL 83-130 Pelplin, Pollando ✉ [jagaw53@poczta.onet.pl](mailto:jagaw53@poczta.onet.pl)

27 jul – 1 aŭg. Kuopio (Finnlando). *Arta Lumo*. ✉ Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando ✉ [ArtaLumo@esperanto.fi](mailto:ArtaLumo@esperanto.fi)



4–11 aŭg. Jokohamo (Japanio). *92a Universala Kongreso de Esperanto*. ✉ Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando ✉ [uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net)

11–19 aŭg. Ranzan (Japanio). *40a ILEI-Konferenco*. ✉ Aida Ĉizikaitė, Zamenhofo 5, LT-44287 Kaunas, Litovio ✉ [info@ilei.info](mailto:info@ilei.info)

17–19 aŭg. Kaliningrado (Ruslando). *Sukcena Ondo*. ✉ RU-236039 Kaliningrad ab. ja. 1248, Ruslando ✉ [sezonoj@gazinter.net](mailto:sezonoj@gazinter.net)

18–24 aŭg. Barlastono (Britio). *Somera Festivalo*. ✉ Esperanto House, Station Road Barlaston, Stoke on Trent ST12 9DE, Britio ✉ [eab@esperanto-gb.org](mailto:eab@esperanto-gb.org)

18–25 aŭg. Primorsko-Aĥtarsk (Ruslando). *Rusiaj Esperanto-Tagoj 2007*. ✉ Eduard Kolosov, ul. Tankistov 6-40, RU-400095 Volgograd, Ruslando ✉ [ret-07@mail.ru](mailto:ret-07@mail.ru)

8–9 sep. Monistrol de Montserrat (Hispanio). *6aj Someraj Dialogoj*. ✉ Cami del Pou n-ro 9, ES-08691 Monistrol de Montserrat, Hispanio ✉ [barcelonaesperantocentro@yahoo.es](mailto:barcelonaesperantocentro@yahoo.es)

29 sep – 6 okt. Tossa de Mar (Hispanio). *15a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo*. ✉ Apartat 423, ES-08200 Sabadell, Hispanio ✉ [Luis\\_serrano@mixmail.com](mailto:Luis_serrano@mixmail.com)

## 43aj Baltiaj Esperanto-Tagoj

**La Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET)** okazas ekde 1959 ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio.

BET-43 okazos 14–22 jul 2007 en nordlitovia urbo Šiauliai (214 km de Vilno, 142 km de Kaŭno, 128 km de Rigo, 250 km de Kaliningrado). Šiauliai estas atingebla trajne, buse kaj aŭtomobile. En la urbo, fondita en 1236, nun loĝas 134 mil personoj.

**BET-43** funkcios en Fakultato de sociaj sciencoj de la Universitato de Šiauliai (str. Architektu 1) kun luksaj kondiĉoj por laboro. La partoprenantoj libere povos uzi ĉiujn ejojn kaj servojn de la fakultato (salonoj, ĉambroj, modernaj teknikajoj, muzikiloj, multaj komputiloj kun libera reta aliro k.s.).

**En la programo:** somera universitato, paroliga kaj perfektiga kursoj, literaturaj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, debatoj pri situacio kaj problemoj de Esperanto-movado en Baltiaj landoj, tradukista kurso, pedagogia seminario, seminario de klubestroj kaj aktivuloj, movada lernejo, scienc teknikaj kaj fakaj aranĝoj, instruado de kantoj, junularaj aranĝoj, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj, ekskursoj tra la urbo kaj aliaj apudaj vidindaĵoj, diskutoj, forumoj, libroservo, interkona vespero, diservo, baza konatiĝo kun la litovaj lingvo kaj kulturo, ekspozicioj, filmoj kaj lumbildoj, gazetara konferenco, sportaj ludoj k.a. La organiza komitato atendas proponojn, sugestojn, ofertojn por la programo, ankaŭ sinproponojn.

Ni antaŭvidas eldonon de ĉiutaga gazeto dum la tuta periodo de BET. Aktualajn informojn pri BET-43 oni povas trovi rete [www.esperanto.lt](http://www.esperanto.lt).

Pri aliĝado, loĝado, manĝado, vizoj kaj aliaj demandoj bonvolu korespondi kun la Organiza Komitato ĉe la Litova Esperanto-Asocio:

✉ p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio

☎ +370-37-208503

Fax:+370-37-228616

✉ [litova.ea@mail.lt](mailto:litova.ea@mail.lt)





**9 INTERNACIA  
FOTOKONKURSO**

**Ronaldo Bijtenhoorn (Nederlando). “Marnebulo”**

**Alekseo Kozlov (Ruslando). “Papiliotoj”**

